

INTERNACIA

JURA

REVUO

B·U·D·A·P·E·S·T

3/23/1953



8

INTERNACIA JURA REVUO

ORGANO DE LA INTERNACIA ESPERANTO-ASOCIO DE JURISTOJ

III. Jaro. ☆ N-ro 3 (8). 1968.

ENHAVO

	Paĝo
Vicprezidanto de IEAJ Ervin Stolpe — — — — —	1
Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj Prof. D-ro I. Lapenna (Wembley) — — —	2
Problemoj de la Socialisma Demokratiio en Hungario (II.) D-ro Gy. Ferencz (Budapest) — — — — —	6
La Rajto de Kunveno kaj Organizigo laŭ la Angla Juro E. Goulding (Woking) — — — — —	8
La Rajto de Kunveno kaj Organizigo en Aŭstrujo D-ro A. Halbedl (Knittelfeld) — — — — —	9
La Rajto de Kunveno kaj Organizigo laŭ la Juro de Francujo A. B. (Saint-Malo) — — — — —	10
La Rajto de Kunveno kaj Organizigo laŭ la Juro de Germana Federacia Respubliko D-ro L. Röhl (Höchstädt) — — — — —	11
La Rajto de Kunveno kaj Organizigo laŭ la Juro de Hungarujo D-ro L. Márton (Budapest) — — — — —	12
La Rajto de Kunveno kaj Organizigo en Itala Juro D-ro U. Stoppolini (Pistoia) — — — — —	13
La Rajto de Kunveno kaj Organizigo en Norvegujo T. A. Hoeg (Oslo) — — — — —	14
La Rajto de Kunveno kaj Organizigo laŭ la Usona Juro Prof. D-ro K. Sheard (Cleveland) — — —	15
Leĝo pri la Nova Kriminala Kodo en Rumanujo D. Vernescu (Bucuresti) — — — — —	16

Redaktoro:

D-ro Lajos Márton
Budapest 502. Pf. 13.
F. k.: Dr. Mátéfy József,
500. Pest megyei Nyomda, Vác. 69-3293.

VICPREZIDANTO DE IEAJ

Ervin Stolpe

naskiĝis en jaro 1894, en Bromberg (tiam germanlanda urbo, nun pollanda Bydgoszcz). Li vizitadis tie la humanisman gimnazion inter jaroj 1904—1913. Poste li studadis juron en universitatoj de urboj Leipzig, Heidelberg kaj Berlino. En jaro 1926 li fariĝis juĝisto, kaj en 1927 estis nomumita en sama posteno je Berlino. Dum la hitlera tempo la naziistoj persekutis lin. Dum jaro 1946—1947 denove kiel juĝisto li deĵoris ĉe la distrikta juĝejo Berlino-Spandau, inter 1947—1960 ĉe la supera tribunalo — Kortumo — de Berlino. Ekde jaro 1961 li fariĝis pensiulo. En la Esperanto-movado li partoprenas kiel organizitulo de jaro 1913.



Glosaro — — — — —	17
Nova Konstitucio en Germana Demokratia Respubliko E. Gruhle (Leipzig) — — — — —	18
Opinio — — — — —	19
Bibliografio — — — — —	19
Pri Geedzeco kaj Familio J. Snejder (Ĥarkov) — — — — —	20
Internacia Privata Juro O. Paquay (Liège) — — — — —	21
Protokoloj de la Kunvenoj de IEAJ dum la U. K. en Madrid — — — — —	22
Enciklopedio de Esperanto — — — — —	23
Feriu en Jugoslavio — — — — —	23
Mallonge — — — — —	23

Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj

I.

Du dokumentoj de unuaranga signifo el politika, etika kaj jura vidpunktoj markas la finon de la jaro 1948. La 9-an de decembro la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, kunveninta por tiu sesio en Parizo, unuanime akceptis la Konvencion pri Genocido, kiu poste estis ratifita de konsiderinda nomo da ŝtatoj, kaj ekvalidis la 12-an de januaro 1951, kaj al kiu ĝis la nuna momento entute 70 ŝtatoj apartenas kiel partioj. La sek-vintan tagon, la 10-an de decembro, la Ĝenerala Asembleo akceptis per 48 voĉoj kaj 8 sindetenoj, sen unusola voĉo kontraŭ, la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj.

Se oni dezirus plej koncize karakterizi la du aktojn, oni povus diri, ke la unua havas ĉefe negativan karakteron kaj la dua estas unuavice pozitiva. Dum la Konvencio pri Genocido celas malebligi, ke ripetiĝu la monstraj krimoj faritaj kontraŭ tutaj homgrupoj sole pro iliaj rasaj, naciaj aŭ religiaj trajtoj, la Universala Deklaracio pozitive reasertas kaj firmigas la principon, ke la homoj estas denaske liberaj kaj egalaj, kaj kiel tiaj devas ĝui en la socio adekvatajn rajtojn, al kiuj respondas difinitaj devoj.

Ambaŭ momentoj — tiu de la 9-a kaj tiu de la 10-a de decembro 1948 — estis solenaj kaj emociaj. La sentojn sendube intensigis ankaŭ la fakto, ke tiuj dokumentoj estis fine formulitaj en tiu sama Parizo, kiu pli ol 150 jarojn antaŭe, en aŭgusto de 1789, proklamis la gloran francan Deklaracion pri la Rajtoj de la Homo kaj Civitano, kaj kiu tial jam delonge fariĝis por la tuta mondo iusence simbolo de libereco kaj homaj rajtoj. Mi havis la grandan privilegion persone ĉeesti la laborojn de la Pariza Sesio kaj enspiri la atmosferon de kontento, ĝojo kaj esperoj, kiujn la du eventoj pravigis.

Longa estis la vojo, kiu kondukis al la 10-a de decembro. La Franca Deklaracio estis ellaborita en tri tagoj. La preparlaboroj por la Universala Deklaracio daŭris preskaŭ tri jarojn.

II.

KONCIZA ANALIZO

La Universala Deklaracio aperis en multaj lingvoj, inkluzive la Internacian en kvin eldonoj, kaj ĉiu havas la eblecon mem trastudi ĝian tekston. Ĉi tie, do, sufiĉas prezenti nur la esencajn trajtojn de ĝia strukturo por iom faciligi la komprenon.

La Deklaracio konsistas el Antaŭkonsideroj aŭ Solena Enkonduko kaj 30 Artikoloj.

La Enkonduko emfazas la fakton, ke al malrespekto kaj malestimo de la homaj rajtoj kaŭzis barbarajn agojn, kiuj indignigis la konsciencon de la homaro, kaj ke la agnosko de la homa digno, esence ligita al ĉiuj membroj de la homa familio, estas la fundamento de libereco, justeco kaj paco. La Enkonduko plue klarigas la kaŭzojn, pro kiuj estis necese proklami la Universalan Deklaracion, kaj la celon, kiun Unuiĝintaj Nacioj deziras atingi per ĝi.

La tekso mem de la Deklaracio ne estas formale dividita en ĉapitroj, sed en ĝi estas tamen klare distingeblaj tri partoj.

La unua parto (art. 1—21) rilatas al la klasikaj rajtoj kaj liberecoj. En la tri komencaj artikoloj estas esprimitaj la tri grandaj ideoj de la filozofio de la 18-a jarcento: libereco, egaleco kaj frateco de ĉiuj homoj. La ideo pri egaleco estas pli detale difinita en art. 2, kiu emfazas, ke ĉiuj rajtoj kaj liberecoj validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo ne nur laŭ raso, haŭtkoloro, sekto, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato, sed ankaŭ laŭ la lingva aparteno. La agnosko de la lingva egaleco estas aparte grava, ĉar ofte oni inklinas ĝin forgesi kaj abundas la kazoj de lingva diskriminacio kaj sur internacia kaj sur landa niveloj. En art. 3 estas aparte rekonita la rajto je vivo, libereco kaj persona sekureco.

Art. 4—15 pritraktas la logikajn sekvojn de la principoj proklamitaj en la unuaj tri artikoloj. Ili estas: malpermeso de sklaveco aŭ servuteco; malpermeso de torturo aŭ nehumanaj punoj; rajto je jura personeco; egaleco antaŭ la leĝo; rajto je protekto de la fundamentaj rajtoj, rekonitaj de la Konstitucio aŭ de la Leĝo, antaŭ la kompetentaj naciaj instancoj; malpermeso de abritraj arestoj, malliberigoj aŭ ekziloj; egaleco antaŭ la tribunaloj kaj publikeco de la procesoj, sendependeco kaj senpartieco de la juĝistaro; supozo de senkulpeco antaŭ ol la krimo aŭ delikto estas pruvita; principo, ke ne ekzistas krimo, nek estas aplikebla kiu ajn puno, se ili ne estis antaŭe antaŭviditaj de la leĝo; malpermeso de arbitra enmiksiĝo en la privatajn aferojn, familion, hejmon aŭ korespondadon; libereco de cirkulado en sia propra lando kaj en eksterlando; rajto je azilo, krom en la kazo de la t. n. ordinaraj krimoj aŭ de krimoj faritaj kontraŭ la celoj kaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Sekvas ses artikoloj, pritraktantaj la rajtojn kaj liberecojn de la homo sur apartaj kampoj: rajto geedziĝi surbaze de libera konsento de edziĝmatura paro, liberecoj de pensado, konscienco, religio, opinio kaj esprimado, organiziĝo kaj kunvenado. La pure politikaj rajtoj estas difinitaj en art. 21, laŭ kiu ĉiu persono havas la rajton partopreni, ĉu rekte ĉu pere de libere elektitaj reprezentantoj, en la regado de sia lando. La voĉdona rajto devas esti universala kaj egala por ĉiuj, dum la elektoj devas okazi de tempo al tempo per sekreta baloto.

La dua parto (art. 22—28) difinas la novajn, ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn. Montriĝis jam delonge, ke la t. n. klasikaj rajtoj, formulitaj unuavice en la Franca Deklaracio, kvankam siatempe profunde progresemaj, kun la tempo perdis sian plenan valoron, ĉar la ekonomia evoluo postulis kaj novajn garantiojn por la realigo de tiuj rajtoj en la praktiko kaj aldonon de pliaj rajtoj. La pliaro de la akiritaj klasikaj liber-

ecoj, kiuj kompare kun la feŭda servutevo signis grandan paŝon antaŭen, estis fakte ĝueblaj nur de relative malmultaj homoj, dum por la amasoj ili estis tute aŭ grandparte nur iluziaj. Kian sencon, ekzemple, povas havi la principo pri la libereco de penso, de parolo, de kunvenado, de organiziĝo, de preso, de cirkulado ktp., se forestas la materiaj rimedoj, necesaj por la efektiva realigo de tiuj liberecoj? Al kio povas servi la formala rajto partopreni en la regado de sia lando, se manko de la plej necesaj vivrimedoj, manko de kulturo kaj klereco fakte malebligas la realigon de tiu rajto? Tial aŭdiĝis ĉiam pli energiaj postuloj por la rekono de aliaj — ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj — rajtoj, kiel ankaŭ por la agnosko de efikaj materiaj garantioj por ilia realigo.

Tiuj modernaj rajtoj de la homo estas nun formulitaj en la dua parto de la Universala Deklaracio. Art. 22, kiu havas karakteron de ĝenerala enkonduko, proklamas la rajton je socia sekureco, kies sekvo devas esti la realigo de difinitaj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, necesaj al la homa digno kaj al la libera evoluo de la homa personeco. Laŭ la deklaracio, ili estas: la rajtoj al laboro, al egala kompenso por egala laboro, al organiziĝo en laboristaj sindikatoj; rajto al ripozo; rajto al socia asekuro kaj al vivnivelo sufiĉa por certigi la bonfarton kaj sanon de la individuo kaj de liaj familianoj; rajto al senpaga elementa edukiĝo kaj al egala atingeblo de la supera edukiĝo; rajto al libera partopreno en la kultura vivo, al ĝuado de la artaj valoroj kaj al profitado de la atingoj de la scienco.

La tria parto konsistas el la tri lastaj artikoloj, nomataj ofte tegmento-artikoloj, ĉar ili iamaniere kovras la tutan Deklaracion, starigante kelkajn ĝenerallajn principojn pri ĝia signifo kaj interpretado. El la tri artikoloj aparte grava estas art. 29, ĉar ĝi akcentas, ke al la rajtoj respondas difinitaj devoj. Nur la plenumo de la devoj al la socio kaj al unuopuloj, konforme al la principo entenante en art. 1, laŭ kiu la homoj devas konduki unu al la alia en spirito de frateco, ebligas plenan disvolviĝon de la personeco.

La lasta artikolo proklamas la principon, ke en la interpretado de la Deklaracio nenio povas esti komprenita kiel donanta al kiu ajn ŝtato, grupo aŭ individua persono la rajton fari ion, kiu detruus kiu ajn rajton aŭ liberecon difinitan en la Deklaracio.

III.

JURA KARAKTERO KAJ ETIKA SIGNIFO

Kia estas la jura signifo kaj atingopovo de la Universala Deklaracio?

Jam dum la diskutoj en la Komisiono pri la Homaj Rajtoj aŭdiĝis opinioj, de la Universala Deklaracio ne havos devigan karakteron. Komentante pri la projekto de la Deklaracio, la Nederlanda Registaro atentigis, ke la Deklaracio „havas nur moralan signifon”, dum la Pakto pri la Homaj Rajtoj, ellaborota poste, estos „jure deviga instrumento” por tiuj, kiuj estos ratifintaj aŭ alimaniere akceptintaj ĝin formale. Laŭ la Usona Registaro la Deklaracio devus servi al UN nur kiel rimedo por atingi internacian kunlaboradon kun la celo antaŭenigi la agnoskon kaj observadon de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj; la Deklaracio, plue, de-

vus inspiri individuojn kaj grupojn en iliaj klopodoj progresigi la respekton kaj observadon de la homaj rajtoj. Britio esprimis la opinionon, ke la Deklaracio estos nenio alia, ol listo de idealoj, kiujn la homaro devus klopodi atingi, kaj neniel entenos preskribojn, kiuj estus en kiu ajn senco devigaj. Dum la diskutoj en la Pariza Sesio de la Ĝenerala Asembleo mem, sinjorino Roosevelt (Usono) ripetis, ke la Deklaracio estos nek traktato, nek internacia akordo, kaj ke ĝi certe ne kreos kian ajn juran devon por la Ŝtatoj-Membroj. Ĝi estos nur deklaro de bazaj principoj pri la fundamentaj rajtoj, establonta komunan celon de atingo por ĉiuj popoloj. Similajn opiniojn havis ankaŭ la reprezentantoj de multaj aliaj ŝtatoj. Aliflanke, la reprezentanto de Francio — sinjoro René Cassin, la ĉefa verkinto de la projekto — forte akcentis, ke la Deklaracio, kvankam sen deviga jura forto, tamen havos tre realan valoron, ĉar ĝi povos esti rigardata kiel aŭtoritata interpretado de la Ĉarto koncerne ĉiujn ĝiajn regulojn rilatantajn al la homaj rajtoj.

La starpunkto, ke la Deklaracio estas nur „komuna celo de atingo por ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj”, eniris ankaŭ en la Enkondukon. Tamen, tuj estas aldonite, ke „ĉiu individuo kaj ĉiu organo de la socio, konstante atentante ĉi tiun Deklaracion, devas strebi al respektigo de tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj per instruado kaj edukado”.

Estas sendube, ke la Ĝenerala Asembleo akceptis la Deklaracion en la senco de la art. 13/1b de la Ĉarto, kiu antaŭvidas por tia kazo la formon de rekomendo. Tial, el formale-jura vidpunkto, la Universala Deklaracio kiel tia estas nur simpla rekomendo, do nedeviga deziresprimo.

Alie prezentigas la afero, se oni ekzamenas la Deklaracion el vidpunkto de ĝia enhavo en rilato al la Ĉarto de UN kaj en la lumo de kelkaj fundamentaj principoj de internacia juro.

Jam en 1949, do tuj post la akcepto de la Universala Deklaracio, kiam en la literaturo de internacia juro oni ĝenerale neis la devigan valoron de la Deklaracio, mi provis argumenti kaj en artikoloj kaj en prelegoj favore al la tezo, ke la Universala Deklaracio, kvankam formale nur rekomendo, tamen laŭ sia enhavo estas deviga.*

La ĉefaj argumentoj estis kaj restas:

1. Ke la Ĉarto de UN havas devigan karakteron, pri tio ne povas ekzisti kia ajn dubo. Tial, ĉiuj partoj de la Ĉarto, kiuj rilatas al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, estas ankaŭ devigaj. Ili formas parton de la nuntempa internacia juro. La Ĉarto mem ne precizigas al homajn rajtojn. Ĝi nek difinas ilin, nek listigas ilin. Tion faras la Universala Deklaracio, kiu estas logike kaj organike ligita al la Ĉarto. La Deklaracio nur pli-precizigas tion, kion — laŭ la Ĉarto — jam estas deviga parto de internacia juro. Se la Unuiĝintaj Nacioj, per la akcepto de la Ĉarto, devontigis sin progresigi la respekton kaj observadon de la homaj rajtoj, tiu devigo estas jure valida. Sed pri kiuj rajtoj do povas temi, se ne pri tiuj, kiujn entenas la Universala Deklaracio?

* En la Internacia Lingvo vidu pri tio Ĉapitron VIII. de la libro *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo*, Rotterdamo, 1952, precipe pp. 89 ks. s. kaj 131 k. s.

2. Unu el la ĉefaj fontoj de publika internacia juro estas la ĝeneralaj juraj principoj rekonitaj de ĉiuj civilizitaj popoloj. La Universala Deklaracio resumas la ĝeneralajn jurajn principojn, rekonitajn nuntempe de la civilizitaj nacioj, sur la kampo de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Se, sen tiaspeca dokumento, povus ekesti duboj koncerne la demandon ĉu iu rajto aŭ libereco estas fakte rekonitaj de la civilizitaj nacioj, nun, post la proklamo de la Deklaracio, tiaj duboj ne povas ekzisti. La Deklaracio estas evidenta pruvo, ke la civilizitaj nacioj rekonas la liberecojn kaj rajtojn, kiujn ĝi entenas, kiel ĝeneralajn jurajn principojn.

3. Fine, grava helprimedo por la konstato de la reguloj internacia juro estas, interalie, la teoriaj verkoj de la plej gravaj fakuloj. Se, do, teoria verko de konata fakulo povas esti uzata kiel rimedo por konstati aŭ por korekte interpreti iun juran regulon, des pli povas esti utiligita tiel grava dokumento, kiel la Universala Deklaracio, verko ne de unu fakulo, sed de granda nombro da oficialaj ŝtataj reprezentantoj kaj de fakuloj apartenantaj al ĉiuj juraj sistemoj de la terĝlobo.

Senkonsidere al la supraj argumentoj, ekde la komenco estis klare, ke la Universala Deklaracio havas grandegan, vere senprecedencan moralan kaj etikan valoron. Ĝi ankoraŭfoje rekonis la esencan egalecon de la homo kaj difinis liajn rajtojn en ĉiuj partoj de la terĝlobo, tute egale al kiu raso, nacio, religio, lingvo aŭ sekso li apartenas. Ĝi fariĝis simbolo de la tuthomeco kaj de la universaleco de la mondo, kiu estas proprajo de la Homo, super ĉiuj landlimoj, haŭtkoloroj, flagoj kaj konvinkoj.

La evoluo en la lastaj 20 jaroj montris, ke estis prava la starpunkto, laŭ kiu la Deklaracio havis ne nur etikan-moralan signifon, sed ankaŭ juran valoron. Unuopaj artikoloj de la Deklaracio komencis esti citataj kiel jure devigaj antaŭ la kortumoj de diversaj landoj. En internaciaj rilatoj, eĉ la ŝtatoj, kiuj komence esprimis dubojn koncerne la juran forton de la Deklaracio, ne hezitis citi ĝin aŭ akuzi aliajn ŝtatojn, ke ili malobservis siajn devojn konforme al la Deklaracio. En la praktiko de Unuiĝintaj Nacioj la Universala Deklaracio estis ĉiam pli ofte citata kiel jure deviga. En la konata kazo de rusaj edzinoj la Ĝenerala Asembleo de UN akceptis Rezolucion, en kiu ĝi deklaris, ke la paŝoj entreprenitaj de la sovetaj aŭtoritatoj por malebligi al rusaj virinoj, edziniĝintaj al eksterlandanoj, forlasi Sovetan Union por atingi siajn edzojn en eksterlando, „ne estis konformaj al la Ĉarto”. En la Rezolucio estis menciitaj art. 13 kaj 16 de la Deklaracio por subteni tiun konkludon. La Ĝenerala Asembleo citis la Deklaracion ankaŭ en pluraj aliaj rezolucioj por apogi sian starpunkton rilate la traktadon de personoj de hinda aŭ pakistana origino en Sudafriko, rilate al administracion de Sudafriko kaj la politikon de apartigo praktikatan de tiu lando. La Konsilo de Sekureco en Rezolucio de la 4-a de decembro 1963 alvokis la registaron de Sudafriko tuj ĉesigi siajn diskriminaciajn agadojn, kiuj estis rigardataj kiel „kontraŭaj al la principoj kaj celoj de la Ĉarto, kaj kiuj signifis malobserven de ĝiaj devoj kiel Membro de UN kaj de la reguloj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj”.

Tiu praktiko montras, ke Unuiĝintaj Nacioj rigardis kaj rigardas la Universalan Deklaracion kiel jure devigan.

IV.

INTERNACIAJ KONVENCIOJ

La laboro de Unuiĝintaj Nacioj ne finiĝis per la akcepto de la Universala Deklaracio. Lasante flanke en tiu ĉi kunteksto la agadojn de UN, de Unesko kaj de aliaj organizaĵoj por diskonigi la principojn kaj regulojn de la Universala Deklaracio, kiel ankaŭ la laboron de tiuj organizaĵoj por progresigi la observadon de la homaj rajtoj en la mondo, necesas ĉi tie menciiti la ampleksan agadon jam plenumitan sur la kampo de interŝtataj konvencioj.

En la lastaj du jardekoj Unuiĝintaj Nacioj ellaboris 16 multflankajn konvenciojn en la sfero de homaj rajtoj, sendepende de la diversaj konvencioj akceptitaj de ILO kaj de la konvencioj de la Ruĝa Kruco en 1949. La menciitaj 16 konvencioj de UN estas divideblaj en du grupojn. Al la unua kategorio apartenas la konvencioj rilatantaj al apartaj rajtoj aŭ liberecoj, ekzemple la menciita Konvencio kontraŭ genocido de 1948, aŭ la konvencioj kontraŭ senŝtataneco de 1951 kaj 1954, kontraŭ sklaveco de 1956, kontraŭ deviga laboro de 1957, por la elimino de ĉiuj formoj de rasa diskriminacio de 1965; pluraj konvencioj rilate la familion, ekz. pri la ŝtataneco de edziniĝintaj virinoj (1957), pri konsento al geedziĝo kaj minimuma aĝo por geedziĝo (1962). Siavice Unesko akceptis en 1960 konvencion kontraŭ diskriminacio en edukado

Nur parto de la 16 konvencioj estis ratifitaj aŭ akceptitaj alimaniere. Tial nur tre malmultaj jure ekvalidis. Ne estas eble trakti ĉi tie la kaŭzojn de tiu bedaŭrinda stato, sed estas interesa menciiti, ke laŭ dokumento, eldonita de UN, unu el la kaŭzoj, kiuj malhelpas aŭ eĉ malebligas al la ŝtatoj akcepti tiujn konvenciojn, estas la lingva obstaklo. „Se la lingvo de la ŝtato ne apartenas al unu el la oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj” — estas eksplicite dirite en la dokumento — „la teksto de la konvencioj devas esti tradukitaj en la oficialan lingvon aŭ oficialajn lingvojn de tiu ŝtato; ĉio ĉi postulas maŝinaron kaj personaron, kiu havas la necesajn spertojn”**, kaj tiuj spertoj plej ofte mankas.

La dua grupo de konvencioj konsistas el tri eksterordinare gravaj traktatoj, kies celo estas ĝenerala. Temas unuavice pri du paktoj por la apliko de la Universala Deklaracio. Unu el ili koncernas la ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn; la alia rilatas al civitanaj kaj politikaj rajtoj. Ambaŭ estis akceptitaj de la Ĝenerala Asembleo la saman tagon, nome la 16-an de decembro 1966, kaj prezentas la rezulton de 18-jara intensa laboro. La tria grava akto estas la Fakultativa Protokolo al la Internacia Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj.

La Internacia Pakto pri Civitanoj kaj Politikaj Rajtoj (53 artikoloj) rilatas ĉefe al la klasikaj rajtoj kaj liberecoj entenataj en la Universala Deklaracio. Parte ĝi ripetas la rajtojn kaj liberecojn laŭ la Deklaracio, parte ĝi pliprecizigas ilin. En pluraj artikoloj la Pakto — interalie — enhavas regulojn pri la lingva egaleco.

** United Nations, A (CONF. 32) 15, 1968, p. 7.

Artikolo 2 preskribas, ke la Ŝtatoj-Partioj devigas sin cetrigi al ĉiuj individuoj sur siaj respektivaj teritorioj ĉiujn rajtojn rekonitajn en la Pakto senkonsidere al ilia lingva aparteno; art. 4 eksplicite malpermesas lingvan diskriminacion; art. 14 preskribas, ke akuzito devas tuj esti detale informita pri la akuzo en lingvo, kiun li komprenas, kaj li ne rajtas havi senpagan helpon de interpretisto, se li ne parolas la lingvon uzatan de la kortumo; art. 24 denove mencias ankaŭ la lingvan diskriminacion en ligo kun la rajtoj de neplenaĝuloj; art. 25 garantias al ĉiu la rajton partopreni en la publikaj aferoj de sia lando, senkonsidere al la lingva aparteno; art. 26 deklaras la egalecon de ĉiuj antaŭ la leĝo kaj malpermesas, kiun ajn formon de diskriminacio, inkluzive la lingvan; art. 27 eksplicite garantias la rajtojn de minoritatoj, precipe la rajton ĝui sian propran kulturon kaj uzi sian lingvon.

La Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj (31 artikoloj) rilatas ĉefe al la rajtoj kaj liberecoj entenataj en la dua parto de la Universala Deklaracio, analizita supre. Tiu ĉi Pakto havas plurajn preskribojn, kiuj estas preskaŭ identaj al la preskriboj de la Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj, ekzemple koncerne la rajton de ĉiu popolo decidi mem pri sia sorto. En aliaj partoj la Pakto difinas la rajtojn je laboro, je organizo de sindikatoj, je striko, socia sekureco, protekto de la familio, adekvata vivnivelo, edukado, partoprenado en la kultura vivo kaj ĝuado de ĉiuj atingoj de la scienco. Ankaŭ tiu ĉi Pakto garantias lingvan egalecon en pluraj artikoloj, precipe en tiu, kiuj rilatas al la kulturaj rajtoj. La lingva egaleco estas eksplicite menciita en art. 2/2 (ĝenerala rekono de egaleco koncerne ĉiujn rajtojn kaj liberecojn formulitajn en la Pakto), kaj implicite en aro da aliaj artikoloj, ekzemple en art. 13 koncerne edukadon kaj art. 15 rilate artan kaj sciencan kreadon, kaj ĝenerale kulturan vivon.

En la sino de Unuiĝintaj Nacioj okazis longaj diskutoj ĉu ellabori unu ĝeneralan pakton, kiu rilatus al ĉiuj rajtoj kaj liberecoj proklamitaj en la Universala Deklaracio, aŭ fari tion en la formo de du paktoj. La ĉefa argumento favore al du dokumentoj estis, ke pluraj ŝtatoj estis rigardataj kiel maturaj por ratifi aŭ alimaniere akcepti en formo de konvencio ĉu la klasikajn politikajn rajtojn, ĉu la modernaj ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn, sed ne ambaŭ. Tial, oni esperis, formulante la homajn rajtojn kaj liberecojn en du sendependaj aktoj, ke oni faciligos la subskribon kaj akcepton ĉu de unu, ĉu de alia, ĉu de ambaŭ. Malgraŭ tiuj esperaj, ĝis la nuna momento nur tre malmultaj ŝtatoj subskribis la du paktojn. Neniu el ili ratifis aŭ alimaniere akceptis ĉu unu, ĉu la alian. Sekve ili ankoraŭ ne ekvalidis.

Rilate la maŝinaron por devigi la Ŝtatojn-Partiojn plenumi siajn devojn, ekzistas sufiĉe granda diferenco inter du paktoj.

Laŭ la Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, la Ŝtatoj-Partioj divigas sin regule raportadi al Ekonomia kaj Socia Konsilo de UN pri la paŝoj, kiujn ili entreprenis en siaj respektivaj landoj por progresigi la rajtojn entenatajn en la Pakto. La Ekonomia kaj Socia Konsilo povas transdoni tiujn raportojn por stud-

ado al la Komisiono pri la Homaj Rajtoj. La aliaj ŝtatoj rajtas komenti. Ankaŭ la Ĝenerala Asembleo povas, se nese, fari rekomendojn surbaze de la raportoj de la Ekonomia kaj Socia Konsilo (art. 16—21 de la Pakto).

La Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj antaŭvidas pli efikan maŝinaron, nome 18-membran Komitaton pri Homaj Rajtoj, kiun elektos la Partioj. Tiu ĉi Komitato havos la rajton konsideri kaj fari ĝeneralajn komentojn pri la raportoj, kiujn la Partioj devos prezenti de tempo al tempo rilate la entreprenitajn paŝojn por realigi la rajtojn rekonitajn en la Pakto. Estas antaŭvidita speciala proceduro antaŭ la Komitato por pritrakti la plendojn de unuopaj ŝtatoj kontraŭ aliaj Ŝtatoj-Partioj pro la neplenumo de la devoj konforme al la Pakto. Tiu proceduro validos nur por tiuj Partioj, kiuj akceptos la kompetentecon de la Komitato. En tiaj kazoj la Komitato povas nomi specialan konciliacian (pacigan) komisionon, por ke ĝi provu trovi amikan solvon. Se solvo ne estos trovita, la Komisiono devos raportari al la Komitato pri ĉiuj faktoj kaj esprimi sian opinion pri la ebleco de amika solvo. La Partioj tiam informos la Komitaton ĉu ili akceptas la enhavon de la raporto aŭ ne. La Komitato devas prezenti al la Ĝenerala Asembleo jaran raporton pri sia agado. (Art. 28—54 de la Pakto.)

La tria grava dokumento estas la Fakultativa Protokolo al Internacia pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj. Ĝi estas unu el la plej rimarkindaj dokumentoj en la historio de internacia juro, ĉar ĝi donas la eblecon al individuoj plendi al internacia instanco ne pere de sia ŝtato, sed rekte, se ili rigardas sin viktimoj de malobservo de kiu ajn rajto formulita en la Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj. La internacia instanco, al kiu la individuoj povos plendi, estas la jam menciita Komitato pri Homaj Rajtoj, kiu estos formita, kiam la Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj ekvalidos. La individuoj devos prui en sia plendo, ne nur, ke ili estis viktimoj de malobservo de rekonitaj rajtoj, sed ankaŭ la fakton, ke ili elĉerpis ĉiujn t. n. hejmajn jurajn rimedojn. La ŝtato, kontraŭ kiu la plendo estas direktita, rajtos kompreneble respondi. Post detala esploro de la afero la Komitato devas prezenti sian opinion al la koncerna ŝtato kaj al la individuo. La Komitato ankaŭ devas enmeti resumon pri sia agado laŭ tiu ĉi Protokolo en la jaran raporton al la Ĝenerala Asembleo.

Ĉiu Partio de la Pakto povas fariĝi ankaŭ Partio de la Protokolo. Ĝi ekvalidos tri monatojn post la momento, kiam la 10-a instrumento de ratifo aŭ aliĝo estos deponita ĉe la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝis la fino de 1967 nur 7 ŝtatoj subskribis la Protokolon, sed neniu ratifis ĝin aŭ aliĝis al ĝi. Sekve ankaŭ la Protokolo ankoraŭ ne ekvalidis.

V. KONKLUDO

En la sfero de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj manifestiĝas la sama granda antagonismo, kiu karakterizas ĉiujn fenomenojn de la epoko, kiun ni travivas. Ĝi estas la antagonismo inter la grandega teknika progreso, la senprecedenca evoluo de ĉiuj rimedoj de komunikado kaj la kreskanta interdependeco de ĉiuj

Problemoj de la Socialisma Demokratio en Hungarujo

(Daŭrigo)

II.

La jurkreado estas la plej altgrada ŝtata agado: ĝuste tial en la ŝtata vivo havas signifon determinan la kunligo de la **demokratio kaj jurkreado**. Do, ni devas unuvice esplori en la tereno de jurkreado, kiel rilatas la ebleco al tiu ĝenerale jurkreada maniero, en kiu oni — surbaze de demokrataj principoj — perbalote kons-tatas la juran tezon el inter la variantoj. Unurangan gravecon havas ankaŭ la esplorado de tio, ke kiama-niere oni povas elformi — en tia aŭ alia faktereno de la jurkreado — kolektivon de kompetentuloj en vera esenco de la vorto, anstataŭ la decidrajtaj korporacioj, baziĝantaj sur okazaj elektadoj. Ŝajnas esti prava la principo, ke oni devas serĉadi la eblecojn de la de-mokratio-evoluigo de juraj rimedoj kaj garantioj laŭ la vojo de la aktuala eblecoj kaj ekzistantaj organizaj formoj en la mondo. En la popolamasoj profunde en-radikiĝis la penso, ke la kreado de juro estas afero unuavice de la demokrataj institucioj kaj monopola te-reno de la elektitaj organizoj. Unuavice la leĝofarado estas tiu centra teritorio, sur kiu baziĝas la jurkreada demokratismo. Ĉe la ceteraj jurfontoj, do ĉe tiuj, kiuj lokigis sub la leĝo, la demokratismo ne aperas senpere, sed pere de la leĝo. Rilate al la leĝofarado plurflanken branĉigas la teritorio esplorenda laŭ vidpunkto de evo-luigo de la demokratismo. En la leĝofarada procezo mem ni devas diferencigi la teritorion de leĝofarado, kiu estas dense traplektita per ŝtatojuraj garantioj, de la leĝprepara laborprocezo, kiu estas kunligita kun ĉre gravaj, multnombraj, malfacilaj fakotaskoj, nehavantaj ŝtatojurajn garantiojn. Malgraŭ tio la faka kaj politika flankoj de la leĝofarado ne estas starigeblaj akre kont-

raŭ la ilia, kvankam — el vidpunkto de evoluigo de la demokratismaj juraj garantioj — grava diferenco estas inter tiuj ĉi du fazoj de la leĝofarada procezo. La res-pondeco de la leĝopreparantoj konsistas ĉefe el tio, ke ili — utiligante ĉiujn rimedojn de la scienco kaj tek-niko — prezentu al la leĝdonantoj ju pli perfektan pro-jekton, en konkreta okazo variantojn, servantajn kiel fundamento por la decido. Dum antaŭpreparo de la leĝo ne larĝigo de la demokratismo estas la centra problemo, sed la pliperfektigo de la leĝpreparada faknivelo. La diversaj leĝpreparaj komisionoj devas fariĝi simple fa-kaj korporacioj, eĉ se ili havas socian karakteron.

Por evoluigi de la leĝopreparaj demokrataj elemen-toj, la plej signifa estas la pligrandigo de rolo de la **parlamento, ĝia enigo en la leĝopreparan laboron**. La partopreno de la parlamento en la leĝopreparo povas pligrandiĝi per kreo de apartaj komitatoj aŭ okazaj komisionoj. La demokratismo de la leĝofarado koneksas kun la problemaro de la **leĝodonaj temoj**. La Hungara Konstitucio, same kiel la socialismaj konstitucioj, eks-plicite konstatas pri certaj temoj, ke ili estas leĝe reg-lamentandaj. Hodiaŭ jam fariĝis ĝenerala la postulo, ke la **primara, fundamenta reglamentigo de ĉiuj sociaj rila-toj apartenas al la leĝofarada agosfero**. Tio ĉi signifas ankaŭ tion, ke ĉiuj aliaj juraj reguloj devas bazi sin sur la leĝoj. Do, ĉiu alia jura regulo laŭ esenco de sia enhavo devas **retromontri al la leĝo**. La perspektivon de la evoluo signifas unuavice — anstataŭ la ĝisnuna kutima alvicigo de la leĝodonaj temoj — la **konstitucia fikso de ĉefprincipo mem: la leĝnivelo de la originala jurkreado**. Ĉar oni devas leĝe reglamenti ĉiun bazan

mondopartoj, unuflanke, kaj la malnoviĝintaj formoj de politika organizaĵo, aliflanke. Per unu piedo la hom-aro jam firme ekstaris en la 21-a jarcento, sed per la alia ĝi estas katenita al la 19-a. Tio kaŭzas la bazan konflikton inter naciismo, ne malofte eĉ ŝovinismo, kaj internaciismo; inter la ŝtata suvereneco, kelkfoje eĉ absoluta, kaj la postulato kunekzisti kaj kunlabori in-ternacie. En la sfero de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj ĝi manifestiĝas en la proklamo de la Univer-sala Deklaracio kaj en la akcepto de tuta aro da kon-vencoj kun la celo doni al la homaj rajtoj internacian protekton, unuflanke, kaj en la fakto, ke tiuj samaj ŝtatoj, kies reprezentantoj ellaboris tiujn gravajn doku-mentojn, poste hezitas subskribi aŭ, eĉ se ili subskribas, rifuzas ratifi aŭ alimaniere akcepti ilin. La rezulto estas, ke ni havas nun grandan nombron da internaciaj instrumentoj por protekto de la homaj rajtoj, kun ĉre abundaj kaj detalaj reguloj, sed nur tre modestajn efi-kajn rezultojn.

La homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj estas afero, kiu niteresas nin ĉiujn. En nia propra intereso ni devas, do, fari nian eblon por diskonigi ilin kiel eble

plej vaste kaj klopodi per ĉiuj permesitaj rimedoj atingi ilian kompletan realigon en la praktiko. Unu el la rimedoj sendube estas premi la registarojn de ĉiuj propraj landoj, ke ili subskribu, ratifu kaj akceptu al-menaŭ tiujn konvenciojn, por kiuj ili voĉdonis en la organoj de Unuiĝintaj Nacioj. La jura ekvalido de la 16 konvencioj ellaboritaj en Unuiĝintaj Nacioj, tute speciale de la du Paktoj kaj de la Fakultativa Proto-kolo, kiu, kune kun la Universala Deklaracio, formas la modernan Carton de Homaj Rajtoj kaj Liberecoj, signos grandan paŝon antaŭen. Ĝi estos la komenciĝo de efika kaj efektiva internacia protekto de la homaj rajtoj ĉie en la mondo, kaj tial prezentos larĝajn pers-pektivojn por la plua evoluo kaj prosperado de la hom-aro en spirito de frateco inter la unuopuloj kaj amik-eco inter la popoloj.

Ĉu iluzio aŭ vizio?

En unu el siaj paroladoj, nur kelkajn tagojn antaŭ ol li estis murdita, Robert Kennedy diris: „Iuj homoj vidas la aferojn tiaj, kiaj ili estas, kaj demandas: kial? Mi revas pri aferoj, kiuj neniam estis, kaj demandas: kial ne?” Jes, vere kial ne?

demandon, tuŝantan la tuton de la popolo, tial estas necese programigi al la leŭdemokrata evoluigo la ek-lipson de ediktoj de la ĉefaj organizoj de la popola deputitaro antaŭ la leĝo.

En la socialisma ŝtatorganizo estas primara la rolo de la popola deputitaro, la rolo de la konsilioj, kaj tial specialan gravecon havas la **konsilia demokratio**, la evoluigo de demokratismo de la loka deputitaro. La mandato de la lokaj deputitaraj organoj (konsilioj) devenas el du direktoj: el la elektantoj, kaj el la centraj organoj de la ŝtatpotenco. La enhavo de la mandato setas: reprezentado de tutsociaj kaj lokaj interesoj. La **deputitaraj organoj okupas primaran, direktantan pozicion sur ĉiuj niveloj de la ŝtatorganizo**, kaj ili havas decidan rolon en la disvolvigo de la demokratismo. La plej oftaj mankoj en la praktiko de la reprezentaj organoj estas jenaj: en la laboro la plej supera reprezenta organo, la parlamento montriĝas certa unuflankeco favore de la kontrolaj funkcioj: ĉe la lokaj konsilioj la supera gvidado estas mankhava, okaza: el la reglamentoj, reguligantaj la funkciadon de la lokaj administradaj organoj mankas la denombro de la temaro prezentada al la korporaciaj organoj. Unu el la ĉefdemandoj de pluevoluigo de la konsilia demokratio, de la demokratismo de la lokaj reprezentaj organoj estas la **plifortigo de la direktanta rolo de la ŝtatpotencaj reprezentaj organoj**. Oni devus leĝe reguligi tiujn agosfero-normojn, kies praktikado apartenas nepre al la sesioj de la konsilio. La **decidpovon** de la konsiliaj sesioj, praktikantan en organizaj demandoj krom la elekto de la konstantaj komitatoj (kiuj estas propon- kaj opiniodonantaj kaj kontrolaj organoj de la konsilio) kaj de la plenumkomitato (kiu estas ŝtataadministrativa organo, havanta ĝeneralan agosferon de la loka konsilio), oni devus **larĝigi** la elekton de la plenumkomitataj funkcioj (prezidanto, vicprezidantoj kaj sekretario) kaj ankaŭ al la sekciestroj (ĉefoj de la ofica aparato). En nombraj kazoj la plenumkomitatoj mem — sen jura devigo — larĝigas la sferon de la aferoj pritraktendaj en sesioj, kaj en la praktiko ili klopodas kompletigi la mankojn de la juraj reguloj. La — el inter la konsilantoj elektitaj — konstantaj komitatoj, organizitaj laŭ unuopaj faktaskoj, estas propon- kaj opiniodonantaj kaj kontrolaj organoj de la konsilio, ili ne havas decidpovon. La **deviga priaŭskulto de la konstantaj komitatoj**, precipe en apliko de lojaleco, estas motivita en instancaj aferoj decideblaj per apliko de la relative pli larĝa agosfero de la konsiderado.

Konvene servus la evoluigon de la konsilia demokratio ankaŭ la **distingiga reguligo de la konsiliaj taskoj laŭ niveloj kaj instancoj**. Estas necese emfazi ankaŭ la bezonon pligrandigi la demokration de la konsilio-elektado: estas pripensenda la realigo de kandidatigrajto de la uzinoj kaj institucioj, eĉ la estigo de delegitoj kun voĉdonrajto. La evoluigon de la konsilia demokratio servus la pligrandigo de **ekonomia memstareco de la konsilioj**. Ankaŭ la disvolvigon de la demokratismo limigas tio, kiam la rolo de la komunumaj kaj urbaj konsilioj estas reduktita. Al la aktiveco de la konsilioj oni devas garanti la materiajn kondiĉojn por la solvo de la lokaj taskoj, la instigon entenantan reguligon, kaj oni devas lasi spacon por la vasta eluzo de la lokaj

eblecoj. Oni devas **plielastigi la budĝet-sistemon**, en ĝia planado de la komunumevoluigo. La centre disponigitaj kadroj estas strikte difinitaj, la limigon de ekonomiaj eblecoj la konsilioj sentas tia forto, ke la pritraktado de la budĝeto en la konsili-sesio ne vekas sufiĉan interesigon. Estus esplorinda la eblo: **enkonduki budĝeton por pluraj jaroj**, kaj certigi kredittkadron por la tuta periodo.

La popolekonomia plano unuavice estas verfikala, sekcio-karakterata. Estus pli demokratia, se la Landa Planoficejo ellaborus tian planmetodon, en kiu almenaŭ la **departementaj konsilioj akirus pli grandan rolon en la ellaboro de la teritorio-evoluigaj planoj**. En socialisma ŝtato, apud la ŝtataadministrado, la memadministrado de la socio etendiĝas je la aktiveco de la tuta socio. Tial en la evoluigo de la demokratismo de nia ŝtataadministrado **pligrandiĝas la rolo de la sociaj organoj**. La diferenco inter la ŝtatorganoj kaj sociaj organoj estas elmontrebla en du bazaj rilatoj. La socialisma ŝtato estas la plej ĉirkaŭtena organizo de la socio, en ĝi esprimiĝas la tutsociaj interesoj. Dume la sociaj organoj ĉirkaŭtenas nur parton de la civitanoj. La ŝtataj organoj havas publikan aŭtoritaton, eligas jurajn agojn, kies validigon per ŝtata devigo ili certigas. La ŝtataadministradaj organoj unuavice solvas siajn taskojn per pagita, profesia aparato. En konsiderinda parto de la sociaj organoj la pagita aparato ne estas tiel grandnombra, ĝi prizorgas nur la plej necesajn administradajn kaj organizajn taskojn. Plejparton de la administradaj funkcioj la anoj memvole prizorgas en sia laboro. La ŝtataadministradaj kaj la **sociaj organoj** ne nur deferencas, sed ili havas ankaŭ multajn komunajn trajtojn. Tiu ĉi **komunaj trajtoj plifortiĝas** dum la evoluado. La ŝtataadministradaj organoj laŭgrade transformiĝos je sociaj organoj. Cetere la ŝtataadministradaj organoj ne nur per pagita profesia aparato plenumas siajn taskojn, sed ankaŭ per larĝskala — en socia laboro farata — kunhelpo de la socioj. La validigo de agoj de la ŝtataadministradaj organoj finfine per ŝtata devigo estas garantiata, tamen ili atingas la observon de iliaj agoj per konvinko ĉiam pli forte. La transdono de unuopaj taskoj de la ŝtataadministradaj organoj al la sociaj organoj estas unu el la organizaj rimedoj por la ĝeneraliĝo de la socialisma demokratio, tamen la ĝeneraliĝo de la socialisma demokratio, la **partopreno de ĉiu socio en la direktado de la sociaj aferoj — enkarde de la ŝtata organizaĵo — primare realiĝos**, kaj ĉar la ŝtataj organoj estas esprimiloj de la tutsocia intereso, oni ne povas meti egaligan signon inter la du formoj de la evoluo de la socialisma demokratio. La **limoj**, inter kiuj la transdono de taskoj de la ŝtataadministradaj organoj al la socioj organoj povas okazi, kiuj limoj samtempe formas la kondiĉojn de la agosfero-transdono estas jenaj: kiom la socia organo ĉirkaŭtenas la sociojn, kiom evoluis efektive la socia spontanea aktiveco: kiom estas necesa la pagita, profesia aparato por solvi la konkretan taskon: kiom postulas la solvo de la konkreta tasko la publikan aŭtoritaton, la aplikon de la ŝtata devigo: kiom validas la interna demokratio de la konkreta socia organo: ĉu estas solvebla la validigo de la tutsociaj interesoj ankaŭ tiuokaze, se la konkreta ŝtata tasko transiras en la agosferon de la socia organo. La **sociaj organoj multflanke partoprenas en la solvo**

La Rajto de Kunveno kaj Organizigo laŭ la Angla Juro

Enkonduko. Britujo posedas neniun konstitucion aŭ alian fundamentan leĝon. Tial ekzistas neniŭ perleĝa garantio pri la ĝeneralaj homaj rajtoj. Tial ankaŭ ĉiu ago (inter aliaj, ĉiu kunveno kaj ĉiu organizo) estas legitima, krom tiuj, kiujn iu pozitiva leĝo malpermesas.

A) RAJTO DE KUNVENO

Jen la specoj de kunvenoj, kiuj estas malpermesitaj:

- a) Kunveno, kies celo estas krimo, ekzemple kunveno por prepari rabadon.
- b) Kunveno, kiu alstrebas legitimilan celon per kontraŭleĝa perforto, ekz. kunveno por perforte eksigi la ministraron. Estas rimarkinda tio, ke oni plene rajtas pace kunveni, eĉ se la kunvenontoj scias, ke iliaj kontraŭuloj perforte atakos.
- c) Kunveno de pli ol 50 homoj apud la parlamento dum tago, kiam kunsidas la parlamento.
- d) La magistrato povas, por eviti gravan publikan malordon, malpermesi projektitan procesion tra la stratoj. Tiun povon tamen oni tre malofte praktikas.

B) RAJTO DE ORGANIZIĜO

1. Asocioj

- a) 1. Juraj formoj kaj antaŭkondiĉoj.

Asocio ekestas de la interkonsento de almenaŭ du personoj por komune celi iun difinitan objekton. Ĝenerale la interkonsentantoj starigas regulojn por regi la agadon de la asocio, kaj konfidas al unu aŭ pluraj el si la tenadon de komuna mono de la asocio.

de la ŝtadadministradaj taskoj. Estas konstatebla la apliko de jenaj formoj: a) La socia organo — laŭ metodo de la socia memadministrado — konkretan branĉon de la socia aktiveco administras, kaj en tiu konkreta branĉo oni ĉesigas la ŝtadadministradajn organojn. Tia estas la situacio ĉe ni, p. e. en la administrado de la korp-eduko kaj sporto. Pri la transdono de tuta ŝtadadministrada branĉo nur la plej supera popola reprezenta organo povas decidi, kaj nur en formo de la leĝo. Ĉar la Registaro super ĉiu ŝtadadministrada branĉo praktikas la inspektadon, tial tiu ĉi inspekta aktiveco de la Registaro ne ĉesas post la transdono de la tuta branĉo al la socia organo. Ankaŭ la fakinspektado super la ekonomiaj organizoj kaj institucioj de la socia organo flanke de tiuj branĉorganoj restas, kiuj cetere disponas pri tiaj rajtoj. b) La tuton de la administrada branĉo administras la socia organo, ses paralele kun la metodo de socia memadministrado (konvinko, administrado per senpaga socia laboro) la socia organo disponas pri rajtigoj de publika aŭtoritato, t. e. jure la socia organo samtempe kvalifikigas kiel plenuma, dispona organo de la ŝtadadministrado. Tiel ekzemple la administradon de la sociaasekurado prizorgas la sindikatoj, ilia agosfero etendiĝas en tiu tereno de la socialasekurad-administrado, kiun antaŭe prizorgis la ŝtadadministrada organoj (Ministerio de Laboraferoj). c) La socia organo trans-

La tipa asocio ne posedas juran karakteron, krom tiu de la apartaj anoj. Ili estas per kontrakto ligitaj inter si laŭ la enhavo de sia interkonsento (t. e. normale de la regularo). La havaĵo de la asocio estas ilia kunhavaĵo, pri kiu ili rajtas laŭ sia volo disponi — eĉ kontraŭ la regularo, se ĉiuj anoj unuanime tiel decidas.

2. Registriĝo.

Asocio devas registriĝi nur en kazo, se ĝi volas provizadi al la anoj drinkaĵojn. Nature, asocio devas registriĝi ankaŭ por akiri juran personecon (v. sube).

3. Jura Personeco.

Kiu ajn asocio rajtas registriĝi laŭ la leĝo pri akciaj kompanioj kaj tiel havigi al si la juran personecon. Kiam temas pri nekomerca asocio, la statuto kutime atribuas al la akcioj nur bagatelan valoron, malpermesas la disdividon de eventuala profito, kaj malpermesas la transdonon de akcioj.

Ekzistas aparta leĝo, per kiu kluboj de la laboristaro preskaŭ senkoste povas akiri la juran personecon.

Tre gravaj kaj imponaj asocioj iufoje atingas la juran personecon per reĝa dekreto aŭ per speciala leĝo de la parlamento.

- b) Fondigo. Vidu a) 1., supre.

c) Malpermeso. La jenaj asocioj estas malpermesitaj:

1. Asocioj, kiuj postulas de la anoj juron, ke ili faros ŝtatperfidon aŭ murdon.
2. Asocioj, kies anoj ne rajtas scii la nomojn de siaj kunanoj aŭ de la asociaj oficistoj.

prenas taskoparton, apartenantan al ŝtadadministrada agosfero, kaj kun tiu la necesan publikaŭtoritatan rajtigon ĝi ricevas. Per tio la socia organo eniĝas en la ŝtadadministradan hierarĥion, ĝiaj agoj estas ŝtadadministradaj agoj. d) La ŝtadadministrada organo kaj la sociaj organoj solvas la saman taskon, la antaŭa per instancaj ŝtadadministradaj rimedoj, dum la lasta laŭ metodo de la socia memadministrado, per konvinko. Do en la konkreta branĉo ekzistas ŝtadadministrada kaj ankaŭ socia organo. Ili paralele sen tio saman taskon solvas, ke unu estus subordininta al la alia, nur la metodo de la administrado kaj organizado diferencas. Tiu ĉi socia organo sian aktivecon ne nur sur la anaron etendas, sed ĝia spontanea aktiveco influas al la tuta socio. e) La kooperado de la sociaj kaj ŝtadadministradaj organoj en la solvo de la ŝtadadministradaj problemoj estas la baza formo de partopreno de la sociaj organoj. Ĉi-kaze la spontanea aktiveco de la sociaj organoj etendiĝas ankaŭ je taskoj, prizorgitaj de la ŝtadadministradaj organoj, kaj tial ili reciproke apogas unu la alian. La kooperado povas aperi en pluraj formoj. La plej evoluinta formo estas tia labordivido inter la ŝtadadministrada organo kaj la sociaj organoj, laŭ kiu la spontanea aktiveco de la sociaj organoj liberigas la ŝtadadministradan organon de prizorgo de unuopaj taskoj. (Daŭrigota)

La Rajto de Kunveno kaj Organizigo en Aŭstrujo

Pri la rajtoj de organizigo por diversaj celoj, la civitanoj estas liberaj. Tamen por konservado de komuna ordo kaj pro baro al misuzo de malbonvolaj geuloj, ili devas atenti la regulojn de la dum jardekoj de sia valideco, plurfoje novelitaj leĝoj pri organizaĵoj de la 15. novembro 1867 (RGBI — Regna bulteno, n-ro 134) kaj pri la kunvenoj (RB1, n-ro 135) de la sama dato.

Rajto de organizigo

Al la citiaj leĝoj estas submetitaj ĉiuj organizaĵoj, kiuj ne intencas mongajnon por entrepreno. Tial la leĝoj ne koncernas pensiinstitutojn, kasojn de subtenado, ŝparkasojn, asekuristojn, ordenojn kaj kongregaciojn de la romkatolika eklezio, aŭ de aliaj leĝe permesitaj konfesioj, por kiuj validas specialaj leĝoj.

La tiel tipaj organizaĵoj, kiaj estas ankaŭ niaj Esperanto-societoj, estas fondataj simple per skriba sciigo impostumita al la kompetenta aŭtoritato, t. e. la liglanda direkto de sekureco kun kvin ekzempleroj de la statuto de la estonta organizaĵo. Se tiu ofico dum kvar semajnoj post tiu ekscio ne malpermesas la fondon, la anoncita organizaĵo rajtas tuj ekadi.

Se la fondo estas malpermesita kun akceptindaj argumentoj, oni povas apelaci al la landregistaro kaj tiam la organizaĵo estos leĝe fondita kun la pravigo de la apelacio.

Al la postulo la proponantoj tuj ricevos atestilon pri la fondsciigo.

Post la fondo dum tri tagoj la estraro devas komuniki la membrojn de la estraro al la polico aŭ, se tia ofico en la loko de la organizaĵo ne ekzistas, al la koncerna distrikto, speciale tiujn estraranojn, kiuj publike reprezentas la organizaĵon.

3. Asocioj kun pli ol 20 anoj kaj sen jura personeco, se ili celas komercan aŭ alian gajnon. La parlamento ĵus enkondukis escepton por permesi asociojn de pli ol 20 juristoj aŭ kontrolistoj, ĉar la profesia etiko de tiaj homoj ne permesas al ili pritraktadi per la nomo de akcia kompanio.

ĉ) Ekzemploj. La Londona Esperanto-Klubo estas tipa asocio, fondita per interkonsento. Ĝi havas presitan regularon, sed ne posedas juran personecon.

2. Politikaj Partioj

a) kaj b) Juraj formoj, fondigo, ktp.

En Britujo ne ekzistas aparta leĝo pri politikaj partioj. La ĝenerala juro pri asocioj, koncize raportita supre, tute validas por ili.

Pro la granda nombro kaj la ŝanĝigebleco de la anaro, la kompania strukturo ne taŭgas por la partioj mem. Mi kredas tamen, ke la centraj organizaĵoj de la ĉefaj partioj fariĝis akciaj kompanioj.

c) Malpermeso. Neniu politika partio en Britujo estas malpermesata. Por publike porti politikan uniformon, oni bezonas oficialan permeson. Malpermesita es-

Ĉi tiun devon aparte devas plenumi ankaŭ ĉiu filio de la organizaĵo.

Organizaĵoj en pluraj liglandoj sciigas la ministrojn por internaj aferoj pri la fondigo.

Fremdlanda organizaĵo bezonas specialan permeson de la nomita ministro.

Ĉiu organizaĵo povas ĉesi sian agadon pro propra decido laŭ sia statuto, per apelaciebla decido aŭtoritata (polico, distrikto) pro danĝero por la stato, pro transpreno de sia laŭstatuta tasko aŭ pro ĉeso de la laŭstauta agado.

Atencojn kontraŭ la komence cititaj leĝoj punas tribunalo (distrikta).

Ekzemplo: Aŭstria Esperantista Federacio estas tegmento super aliĝintaj memstaraj Esperanto-societoj kun propra jura personeco kaj havas statuton akceptitan de la ministro por internaj aferoj.

Ĉio prezentita validas ankaŭ por aŭstria sindikatoj, dum korporacioj, societoj kun limigita aŭ senlima garantio estas regulitaj per specialaj leĝoj. (Leĝo de la 9. aprilo 1873, RGBI, n-ro 70 kaj Leĝo de 6. marto 1906, RGBI, n-ro 58.)

Grandan intereson vekas la stato de la politikaj partioj, ĉar ili devus stari sub la Leĝo pri Organizaĵoj, sed ne laŭ ĝi estas organizitaj, sed ekzistas „preter legem”, ekzistante nur fakte, sed ne jure! Tamen ili formis kaj administras la federacian respublikon kaj la liglandojn (sen jura personeco), disponas pri sumoj el kolitoj, kontribuoj de influigemaj firmaoj, institucioj kaj organizaĵoj, donacoj k. a., krome per siaj delegitoj en la nacia (federacia), landaj kaj urbaj parlamentoj formas la estrarojn, decidas pri leĝoproponoj, impostoj:

tas la dresado de partianoj por aplikadi fizikan performon al politikaj celoj.

3. Sindikatoj

a) kaj b) Juraj formoj kaj fondigo.

Sindikatoj estas asocioj faritaj per interkonsento: vidu 1. a) 1., supre.

Ekzistas registro por sindikatoj. La enskribo havigas al la sindikato kelkajn malgravajn avantaĝojn pri impostoj, procedoj, k. c. Ĝi estas tamen nedeviga, kaj multaj gravaj sindikatoj neniam registriĝis. Registriĝo ne donas perfektan juran personecon.

c) Malpermeso. Neniu speciala malpermeso tuŝas la sindikatojn. Kontraŭe, por faciligi la strikojn, la sindikatoj — ĉu registritaj, ĉu ne — estas malŝarĝitaj de kelkaj respondecoj rilate al krimoj kaj ankaŭ civilaj deliktoj. Nuntempe, oni multe diskutas la demandon, ĉu tiu privilegio estas eble tro larĝa.

La plimulto da sindikatoj finance subtenas politikan partion, kaj tiurilate devas observi iujn regulojn pri la kolektado kaj elspezo de sindikata mono por politikaj celoj.

La Rajto de Kunveno kaj Organizigo laŭ la Juro de Francujo

En Francujo la leĝo donas al ĉiu persono la rajton pri kunveno kaj organizigo.

A) Rajto de kunveno

Laŭ la leĝoj de la 30-a de Junio 1881 kaj 28-a de Marto 1907, la kunvenoj, ĉu privataj, ĉu publikaj, estas tute liberaj sen antaŭa deklaro. Tamen la kunvenoj ne povas okazi sub la publika vojo (strato, placo, ktp.), ili devas okazi en ejo (kafejo, kinejo, kunvenejo ktp.).

Oni rajtas organizi defiladon aŭ alian manifestacion sur la strato, sed la odganizantoj devas fari al la publikaj instancoj antaŭan deklaron almenaŭ tri tagoj antaŭ la defilado aŭ manifestacio (dekreto-leĝo de la 23-a de Oktobro 1935).

Se la publikaj instancoj opinias, ke la venonta manifestacio estas danĝera por la publika ordo, ili rajtas malpermesi ĝin.

B) Rajto de organizigo

1. **Asocioj** (leĝo de la 1-a de Julio 1901). La asocio estas kontrakto, kies celo estas alia ol profito. La franca juro nomos societo la asocion, kies celo estas profitdona.

a) Oni distingas tri diversajn asociojn:

— La nedeklaritaj asocioj, kiujn formas personoj sen informi neniun, estas validaj. Sed ili havas nenian juran personecon: do, ili ne havas propran havaĵon; iliaj aĵoj estas nur la komuna posedaĵo de ĉiuj anoj.

— La deklaritaj asocioj: la asocioj, kiuj deklaras sin ĉe la perfektejo kaj samtempe publikigas en la oficiala ĵurnalo siajn nomon, celon, adreson, ricevas la juran personecon. La deklaro indikas la nomojn kaj adresojn de la estraranoj; al ĝi oni aldonas ekzempleron de la statuto.

La deklarita asocio havas juran personecon, sed tiu ĉi estas limita: ĝi povas nur posedi la havaĵon necesan al ĝia celo; ĝi rajtas ricevi kiel donacojn nur la kotizojn de la anoj kaj la subvenciojn de la publikaj instancoj.

— La asocioj agnoskitaj kiel publike utilaj: kiam asocio havas gravan celon, la registaro povas agnoski ĝin, kiel asocion publike utilan (ekz. la skoltaj asocioj estas agnoskitaj kiel publike utilaj). Tiuj asocioj havas plenan juran personecon kaj povas ricevi heredaĵojn.

b) La asocioj, kies celo estas kontraŭ leĝa aŭ kontraŭ la bonaj moroj, povas esti malfondigitaj. Tiu malfondigo ankaŭ povas okazi, kiam la asocio ne bone funkcias aŭ rifuzas obei la leĝojn.

La malfondigon ordonas:

— ĉu la tribunalo je postulo de iu ajn ano aŭ de la prokuroro;

— ĉu la registaro, se la asocio grave endanĝerigas la ŝtaton aŭ la publikan ordon.

c) Eksterlandaj asocioj: (t. e. asocioj, kies membraro nombras pli ol 25% de eksterlandanoj). Tiuj asocioj povas agi en Francujo nur post antaŭa permeso de la registaro. Do, se UEA dezirus havi sidejon en Francujo, ĝi devus peti la permeson de la franca registaro.

d) Oni povas aldoni, ke francoj ŝatas fariĝi anoj de asocio, ĉar ĉiutage la oficiala ĵurnalo informas pri fondiĝo de proksimume 10—15 novaj asocioj. Kelkfoje oni povas legi la oficialan publikigon de nova Esperanto-grupo, ĉar ĉe ni ĉiuj esperantistaj asocioj (lokalaj kaj nacia) estas deklaritaj asocioj, kiel mi klarigis sube.

2. Politikaj partioj

En Francujo ne ekzistas speciala leĝo pri la politikaj partioj. Tiuj ĉi fondiĝas laŭ la leĝo pri deklaritaj asocioj.

3. Sindikatoj

La sindikatoj estas oficiale permesitaj de la leĝo de la 21-a de Marto 1884, kiun anstataŭis la nova leĝo de la 25-a de Februaro 1927.

a) La sindikato estas asocio, kies celo estas la defendo de profesiaj interesoj. Ĝi povas grupigi ĉu la la-

dungas oficistojn ktp. Ili ekzistas, do, estas jura problemoj kaj unu el la mirakloj de la aŭstra ĉiutago.

Rajto de kunvenado

La ordinara kunveno de societanoj de laŭleĝe formita organizaĵo povas okazi laŭplaĉe.

La laŭstatutaj kunvenoj de la societanoj estas anoncendaj al la polico aŭ (vidu supre) al la distrikto-oficejo 24 horojn antaŭe. Partopreni rajtas ankaŭ invititaj gastoj.

Publikajn, ĝenerale ĉeestablajn kunvenojn (mitingoj) oni devas anonci kun la preparolita temo tri tagojn pli frue.

La kunvenantoj ne estu armitaj, pri kio respondecas la prezidanto de la kunveno, al kiu rajtas partopreni krome delegito de la kompetenta aŭtoritato, laŭ kies

deziro devas esti protokolo. Al li ankaŭ oni devas klarigi la personajn rilatojn de la debetanto(j), se li deziras: li rajtas ankaŭ disirigi la kunvenintaron, se la kunveno evoluis kontraŭleĝe aŭ danĝere por la stato.

Laŭ du leĝoj pri kunvenoj rajtas partopreni mitingojn ĉiuj interesuloj pri la anoncita temo, se la kunveno estas anoncita tri tagojn antaŭ la okaziĝo.

Laŭmoraj, ekzleziaj kaj funebraj procesioj povas okazi sen antaŭanonco.

Atencojn kontraŭ la reguloj de ĉi tiu leĝo punas ankaŭ la distrikta tribunalo.

Kvankam la cititaj leĝoj devenas el la erao de aŭtoritata ŝtato, ili de tiam ne multe ŝanĝiĝas, kiu montras, ke jam antaŭ cent jaroj oni pensis sufiĉe liberecama. Ĝi montras signon, ke la evoluo de la homaro okazas malrapide, sed samtempe ankaŭ esperige.

La Rajto de Kunveno kaj Organizigo laŭ la Juro de Germana Federacia Respubliko

En Germana Federacia Respubliko ekzistas reguloj pri la Rajto de Kunveno kaj Organizigo en la Federacia Konstitucio kaj en la konstitucioj de la membroŝtatoj de la Federacio. Mankas tempo por pritrakti la regulojn de la konstitucioj de la 11 membroŝtatoj de la Germana Federacia Respubliko. La membroŝtatoj ne povas limigi la garantiojn de la Federacia Konstitucio. Tial koncerne nian temon la konstitucioj de la membroŝtatoj havas signifon nur, se ili donas pli ampleksajn rajtojn ol la Federacia Konstitucio. La sekvanta resumo do raportas nur pri la minimumaj garantioj, kiuj validas en la tuta Federacia Teritorio.

A) Rajto de Kunveno

Laŭ art. 8 de la Federacia Konstitucio ĉiuj germanoj rajtas pace kaj senarme kunveni. La Rajto de Kunveno do ne validas por eksterlandanoj. Perfortaj kunvenoj ne ĝuas protekton. Laŭ art. 8 alineo 2 de la Federacia Konstitucio la Rajto de Kunveno povas esti limigita per leĝo por „kunvenoj sub libera ĉielo”. Tiaj kunvenoj devas esti anoncigitaj 48 horojn antaŭe al la koncerna instanco kaj povas esti malpermesitaj pro senpera danĝero por la publika sekureco kaj ordo, laŭ la preskriboj de la Leĝo pri Kunvenoj de la 24-a de Julio 1953. La konstitucia protekto por kunvenoj rilatas al ĉiujcelaj kunvenoj kaj ankaŭ al demonstracioj, silentaj marŝadoj ktp.

B) Rajto de Organizigo

Laŭ art. 9 de la Federacia Konstitucio ĉiuj germanoj rajtos formi organizaĵojn. Oni ne bezonas ŝtatan permeson por fondi asociojn, aŭ aliajn organizaĵojn.

1. Asocioj

La formigo de la asocioj okazas laŭ la reguloj de la Civila Kodo. Ekzistas du formoj: registritaj asocioj kaj neregistritaj asocioj. La fondo de neregistrita asocio estas tre simpla kaj ne dependas de formalajtoj. Ĝi povas okazi buŝe. Neregistrita asocio ne havas juran personecon. Tial ĝi ne povas havi proprietaĵojn. Ekz. bankkonto por neregistrita asocio devas esti je la nomo de la kasisto aŭ de alia membro. La grandaj asocioj ĉiuj estas registritaj. La enregistriĝo okazas en la Asocia Registro ĉe Loka Kortumo. La ĉefaj formalajtoj estas peto de la estraro pri enregistriĝo kun aldono de statuto

laŭ la preskriboj de la Civila Kodo subskribita de minimume 7 membroj. La enregistriĝo devas okazi, se la formalajtoj estas en ordo kaj se la celoj de la asocioj ne estas kontraŭjuraj.

Laŭ art. 9 alineo 2 de la Federacia Konstitucio kaj laŭ la Leĝo pri Asocioj de la 5-a de Aŭgusto 1964, asocioj povas esti malpermesitaj, se iliaj celoj aŭ agadoj kontraŭas la kriminalajn leĝojn aŭ se ili turnas sin kontraŭ la konstitucia ordo aŭ kontraŭ la interkomprenigo inter la popoloj. Pri la malpermeso decidas la Federacia Ministerio pri Internaj Aferoj aŭ la koncerna ministerio de membroŝtato de la Federacio. Kontraŭ tia malpermeso la asocio rajtas apelacii al Kortumo pri Administraciaj Aferoj.

La lokaj Esperanto-grupoj en la Germana Federacia Respubliko preskaŭ ĉiuj estas neregistritaj asocioj; nur kelkaj enregistriĝis en Asocia Registro. La Germana Esperanto-Asocio havas la juran formon de registrita asocio.

2. Politikaj partioj

Politikaj partioj povas esti aŭ registritaj aŭ neregistritaj asocioj. Kelkaj el la grandaj partioj, kiuj ne estas registritaj havas komercjurajn kompaniojn por la administrado de siaj havaĵoj. Ekzistas speciala Leĝo pri Partioj de la 27-a de Julio 1967.

Laŭ art. 21 de la Federacia Konstitucio la fondo de politikaj partioj estas libera. Ĉiu rajtas fondi partion. Laŭ art. 21 alineo 2 de la Federacia Konstitucio partioj povas esti malpermesitaj se ili laŭ siaj celoj aŭ laŭ la konduto de siaj anoj celas al malhelpo aŭ detruo de la fundamentoj de la libereca demokrata ordo, aŭ se ili endanĝerigas la ekzistadon de la Federacio. Pri malpermeso decidas la Federacia Konstitucia Kortumo laŭ peto de la Federacia Parlamento, de la Federacia Registaro aŭ de la Federacia Konsilantaro.

3. Sindikatoj

La sidikatoj tradicie havas juran formon de neregistritaj asocioj; ili havas komercjurajn kompaniojn por la administrado de siaj havaĵoj.

La libera fondo de sindikatoj estas garantiata per art. 9 alineo 3 de la Federacia Konstitucio.

Malpermeso de sindikato povus okazi laŭ la reguloj pri malpermeso de asocioj.

bordonantojn (komercistoj, industriistoj), ĉu la sendependajn profesiulojn (advokatoj, kuracistoj, arkitektoj), ĉu la dungitojn (laboristoj, oficistoj ktp.).

b) La fondigo de sindikato estas libera kaj bezonas nenian antaŭan permeson. Estas nur necese deponi al la urbdomo la statuton kaj la nomojn de la estraranoj. Tiuj ĉi devas esti francaj civitanoj, pli ol 21-jaraĝaj kaj ĝui la rajton pri politika voĉdonado (tiun rajton oni perdas

pro kondamno por grava krimo); ĉiuj membroj devas aparteni al la sama profesio.

c) La sidikato havas plenan juran personecon kaj funkcias laŭ la reguloj fiksitaj en sia statuto.

Se sindikato estas starigita sen respekti la leĝajn postulojn: la prokuroro povas peti monpunon kontraŭ la estraro kaj ankaŭ peti de la tribunalo la malpermeson de la sindikato.

A. B.

La Rajto de Kunveno kaj Organizigo laŭ la Juro de Hungarujo

La Konstitucio de Hungarujo — Leĝo n-ro XX, de 1949 — enhavas la bazajn principojn pri la kunveno kaj organizigo. Ĝia § 56 deklaras: „La Hungara Popolrespubliko — por intereso de evoluigo de socia, ekonomia kaj kultura agado de la laboruloj — konstitucie garantias la rajton de asociiĝo”.

A) Rajto de kunveno

La membroj de la laŭleĝe fondita kaj enregistrita organizaĵo povas laŭplaĉe kunveni.

La laŭstatutajn kunvenojn de la estraro aŭ anoj oni devas antaŭanonci ĉe nenia instanco. Ĝenerale ĉiu organizaĵo — centra kaj loka — havas propran apartan ejon.

Publikajn surstratajn kunvenojn, mitingojn, kiujn povas partopreni ne nur membroj, do, laŭplaĉe kiu ajn, oni devas antaŭanonci.

B) Rajto pri organizigo

La dua alineo de § 56 de la Konstitucio sonas jene: „Hungara Popolrespubliko plenumante siajn taskojn apogas sin al la organizaĵoj de la konsciaj laboruloj. Por defendo de ordo de la popola demokratio, por la pli aktiva partopreno en la socialisma konstruo, por la plivastigo de la kultura eduklaboro, por la realigo de rajtoj de la popolo kaj por flego de la internacia solidareco, la laboruloj kreas sindikatojn, porvirinan, junularan kaj aliajn demokratiajn amasorganizaĵojn kaj ties fortojn ili kunigas en la demokratia Popolfronto. En tiuj organizaĵoj realiĝas la firma kunagado kaj demokratia unueco de la industriaj, agrikultura kaj intelektularaj laboruloj. La laborista klaso sin apoganta al la demokratia unueco de popolo kaj direktata de ĝia avangardo, estas la gvidanta forto de ŝtata kaj socia aktiveco.”

Surbaze de la konstituciaj principoj la § 68 de la Civila Kodo — Leĝo n-ro IV, de 1959 — eldiras, ke la politikaj organizaĵoj, sindikatoj, porvirinaj kaj junularaj organizaĵoj kaj ceteraj sociaj organizaĵoj estas juraj personoj. La Civila Kodo eldiras, ke koncerne la havajajn interrilatojn de la sociaj organizaĵoj estas direktodonaĵoj disponoj de la statuto. La sociaj organizaĵoj en Hungarujo estas tiuj unuavice politikaj amasorganizaĵoj, kies estigo, funkciado kaj rilate al la ŝtato superas la kadrojn de la societo.

La agadon de la societoj regulas la §-j 71—80 de la Civila Kodo jene:

1. Asocioj

La hungara leĝo uzas nur la terminon societo. La parto de Civila Kodo pri societo ne koncernas ekonomiajn organizaĵojn, kies celo estas gajni profiton. Tiaj organizaĵoj estas ekz. kooperativoj kaj akciaj kompanioj.

a) Jura formo: la societoj ĉu landaj, ĉu lokaj estas juraj personoj.

b) Fondiĝo: se almenaŭ dek personoj decidas la fondon de la societo; kreas ties statuton; elektas ĝian afergvidan kaj reprezentan organojn kaj fine la kompetenta ŝtata inspekta organo enregistras la societon. La fondo kaj funkciado (agado) de la societo ne povas okazi kontraŭ la Konstitucio kaj jurnormoj. En la statuto oni devas disponi pri la nomo, sidejo, organizo, afergvida kaj reprezenta organoj de la societo, krome pri la estigo kaj ĉeso de la membreco kaj pri la rajtoj kaj devoj de la membroj.

c) Agado: la plej supera organo de la societo estas la ĝenerala kunsido, kiu rajtas decidi pri ĉiu afero rilatanta al la societo. La ĝenerala kunsido havas ekskluzivan rajton pri elekto de la afergvida kaj reprezenta organoj; pri fikso de la jara budĝeto; pri la traktado de jara raporto de la afergvida organo; pri unuiĝo kun alia societo kaj pri decido de eventuala ĉesiĝo.

La elektitaj societaj organoj respondecas al la ĝenerala kunsido.

La ĝeneralan kunsidon oni devas minimume unuafoje kunvoki dum la jaro.

La decidoj de la ĝenerala kunsido estas kreitaj per plimulto de la voĉdonoj.

Se la decido de la societo estas kontraŭleĝa, aŭ ofendas la intereson de la membroj, la ŝtata prokuroro aŭ iu el la membraro rajtas proponi la neniigon de la riproĉita decido ĉe la ŝtata inspekta organo.

Pri la ŝuloj respondecas la societo per sia havaĵo mem. La membroj devas pagi nur membrokotizojn. Pri la ŝuldoj de la societo — la membroj respondecas nur per la membrokotizo, sed ne per siaj havaĵoj.

La societoj funkcias kiel landaj aŭ lokaj. La landaj societoj povas havi ankaŭ lokajn societojn — filiojn, kaj la samcelaj lokaj societoj povas unuiĝi en komunan asocion.

Super la landaj societanoj la inspektadon kaj kontrolon faras la koncerna ministerio, respektive la komisiita alia supera organo. La lokan societon inspektas kaj kontrolas la urba aŭ departementa magistrato.

La nomo „societo” estas kolektiva esprimo, al tiu nocio apartenas ankaŭ aliaj organizaĵoj, nomataj asocio, grupo, rondo, klubo ktp.

d) Ĉeso: la societo ĉesas,

1. se ĝian ĉeson la ĝenerala kunsido decidas per $\frac{2}{3}$ plimulto de voĉdonoj;

2. se unuiĝas kun alia societo;

3. se sia inspekta organo ĉesigas ĝin pro agado ofendanta aŭ minacanta la ŝtatan, socian aŭ ekonomian ordon de la Hungara Popolrespubliko aŭ la intereson de la membraro;

4. la inspekta organo konstatas ĝian ĉeson, se nombro de la membraro dum daŭra tempo jam ne atingas la minimuman nombron fiksitajn en la statuto, aŭ la societo dum pli ol unu jaro ne funkcias.

La Rajto de Kunveno de Organizigo en Norvegujo

En Norvegujo la rajto de kunveno kaj organizigo estas grava principo. Laŭ § 2 de la Konstitucio ĉiuj enloĝantoj rajtas tute libere praktiki sian religion; kaj laŭ § 100 ili rajtas en gazetoj aŭ en kunvenoj kritiki la regadon de la ŝtato.

Sed ekzistas kelkaj limigoj. Laŭ § 104-a de la krimnala leĝo la persono, kiu fondas privatan organizaĵon kun milita karaktero, estas punata je malliberejo ĝis du jaroj. Estas ankaŭ kontraŭleĝe portopreni aŭ subteni asocion, kies celo estas per saboto aŭ per potenco malkonstrui la ŝtatordon. Laŭ § 211 estas puninde aranĝi publikan prezentadon de malĉastaĵoj.

Oni ankaŭ povas mencii § 329. Ĝi decidas, ke personoj, kiuj kunvenas sur publika vojo aŭ placo, kie ili ne rajtas restadi, estas punataj je malliberejo ĝis 3 monatoj, se ili ne foriras post ordono de aŭtoritatoj.

Koncerne fondiĝon de asocioj mi volas nur mencii la leĝon pri registrado de asocioj de 1. VI. 1934. Laŭ ĝi la departemento por juraj aferoj registras ĉiujn asociojn, kiuj deziras esti registrataj. La antaŭkondiĉoj estas inter alie, ke la asocio havu laluleĝan celon; ke ĝi havu estraron kaj ĝeneralan kunvenon kaj almenaŭ cent membrojn. Ĉiuj politikaj partioj estas en la registro, sed relative malmultaj el la ordinaraj asocioj.

La fono de la leĝo estas la malfacilaĵoj, kiujn Norvega Misio por Maristoj renkontis inter alia en Usono, kiam la asocio deziris aĉeti domojn aŭ bienojn. Atesto de norvega aŭtoritatoj, ke la menciita asocio laŭ la norvega juro estas jura persono, eĉ sen „incorporation” ne sufiĉis.

Laŭ § 21-a registritaj asocioj povas kiel tiaj ekhavi rajtojn kaj devojn. Tio ne signifas tion, ke nur la registritaj asocioj havas juran personecon, sed ke post registrado ne ekzistas tiurilate koncerne la registritajn asociojn.

La registro havas sciigon pri la persono, kiu rajtas devontiĝi la asocion per sia subskribo. La asocio devas informi la departementon pri ĉiuj postaj ŝanĝoj en la statuto. Aliaj kontraktantoj rajtas fidi je la sciigoj de la registro.

Nur treege malmultaj juĝoj rilatas al asocioj, politikaj partioj kaj sindikatoj. Menciinda tamen estas juĝo

dirita de la Supera Kortumo la 24-an de novembro 1967.

La afero koncernas la demandon, ke kiomgrade la sindikato per plimulto rajtas fari decidojn ligantajn por la membroj. La problemo ne estas solvita en la leĝoj. Tial ĝi devas esti solvata per ĝeneralaj jurprincipoj laŭ cirkonstancoj en la unuopaj kazoj.

La sindikato decidis fondi kolektivajn hejman asekuron. La asekuro ampleksis ĉiujn membrojn. Ili pagas la asekuran kotizon per aldonaĵo al la ordinara kontingento. Ne estis permesite por la membroj antaŭgardi sin kontraŭ pago de la aldona kontingento.

4 el la 5 juĝistoj substrekis, ke la primara tasko de la sindikatoj historie kaj fakte estas zorgi pri la intereso de la membroj kiel dungitoj kontraŭ la dungantoj. Sed nuntempe la sindikatoj havas ankaŭ aliajn taskojn, ekzemple ili rajtas organizi asekuron sub moderaj kondiĉoj por iliaj membroj, kaj la membroj ne povas rezisti, ke el la specoj pro tia tasko estas kovrataj per la membroj, kaj la membroj ne povas rezisti, ke la elspezoj pro tia tasko estas kovrataj per la membrakontingento. Tamen, en tiu konkreta afero la membroj devas havi la rajton antaŭgardi sin. Laŭ la decido de la sindikato ili ne havis tian rajton. Tial la decido ne estas valida por ili.

Unu el la juĝistoj opiniis, ke la distingo inter unuaj kaj duaj taskoj estas sensignifaj.

Ili ankaŭ substrekis la praktikon sekvitan de sindikatoj. Ili ofte faras decidojn, kies rezulto estas plialtigo de la kontingento, kaj ĝis nun la malplimulto ĉiam agis konforme al la decido.

Tiu juĝisto trovis, ke la decido pri asekuro ne ofendas ies juran situacion. La sola punkto de devigo estas, ke la membroj devas pagi kotizon por asekura kontrakto farita de la sindikato por ĝiaj membroj, sed kiun kelkaj el ili ne deziras. Ili preferas mem elekti asekuran kompanion.

Ankaŭ tiu juĝisto opiniis, ke eĉ se decido estas interne de la limoj de la celo de la sindikato, la decido povas havi tian enhavon, ke la malkonsentantoj ne devus esti ligitaj, ekzemple se la sindikato ordonas la membrojn aĉeti ĉiujn mastrumajn varojn en kooperativaj vendejoj.

b) Ĝis nun ne estas antaŭfiksataj formoj por iliaj fondiĝo kaj funkciado aŭ reguloj pri iliaj mon-rimedoj. Ĉiu el ili proviziĝas laŭ diversaj manieroj, per subvencioj de pluraj personoj kaj ankaŭ per flankaj komencaj agadoj, krom la kotizoj de la aliĝintoj.

c) Estas nur malpermesata, de la konstitucio mem, la reorganizado de la faŝisma partio.

3. Sindikatoj

La art. 39 de la Respublika Konstitucio diktas: la sindikata organizigo estas libera; la leĝo povas fiksi registrigon de la sindikatoj; per registrigo ili akiras juran personecon kaj tiuj sindikatoj rajtas kontrakti la labor-

kondiĉojn devigajn por ĉiuj laboristoj de la sama kategorio.

a)—b) Ĝis nun ne aperis leĝo pri registrigo de la sindikatoj. Pro tio la sindikatoj jure estas privataj nerekonitaj asocioj; ili agadas en la laborista medio laŭ influoj de la ĉefaj koncernaj politikaj partioj. Tamen en la kontrakta agado ili plej ofte kune laboras.

Aparta leĝo de la jaro 1919 rajtigas la ŝtatan registaron kiel devigajn por ĉiuj laboristoj de la sama kategorio fiksi la laborkondiĉojn kontraktitajn de la sindikatoj, kiuj reprezentas la koncernan kategorion.

c) Ne ekzistas malpermeso fondi sindikatojn.

PROF. KEVIN SHEARD
(Cleveland)

La Rajto de Kunveno kaj Organizigo laŭ la Usona Juro

La unua paŝo por ekscii, ĉu la temo estas pritraktata en la usona juro, estas studi la Usonian Konstitucion. Se oni serĉus en tio la mencion de la rajto krei asociojn, politikajn partiojn kaj sindikatojn, tiu trovus en la amendo jenan:

„Kongreso devas fari neniun leĝon... malpliigi la liberecon pri parolado aŭ gazetaro; aŭ pacema kunveno, kaj peti la registaron por korekti la plendaĵojn.”

Estas tro komplike priskribi en tiu ĉi diskuto la vortojn, „Kongreso devas fari neniun leĝon...” Ĉi signifas tion, ke nek la kongreso, nek la ŝtatoj aŭ iu peranto el ili povas — rajtas — fari iun leĝon, aŭ regulon, kiu malpliigas tiujn liberecojn. La federala leĝo pri sindikatoj malpermesas okupi postenojn en sindikatoj kaj politikaj partioj por tiu, kiu rekomendas la perfortan renverson de la registaro de Usono, aŭ kiu estis kondamnita pro perforta krimo. La Kongreso ne faris leĝon pri la formado de partioj aŭ sindikatoj. Fakte, tiuj du malpermesoj estas farataj ankaŭ per decidoj de la Plej Supera Juĝistaro de Usono, bazitaj sur aliaj liberecoj protektitaj de la Konstitucio.

La rezulto estas, ke kiu ajn regulado de asocioj, politikaj partioj aŭ sindikatoj devas esti per ŝtataj reguloj. La ŝtatoj, kiel la Federala Registaro, estas regataj de la Usona Konstitucio. Do, ili faras ne pli ol certigi, ke estu konforma la aranĝo en la starigo de juraj personecoj. Ĉiu ŝtato havas liberecon krei sian propran procedon, se ĝi ne kontraŭas al la Usona Konstitucio. Do, la leĝoj detale diferencas de unu al la alia, sed ili ĝenerale kongruas.

Ekzemple, grupo de esperantistoj, kiu deziras asociiĝi, ĝi simple kunvenas. Ne necesas registri la grupon ĉe kiu ajn instanco, eĉ havi iun formalan organizaĵon; neniun rajtas malhelpi ilin, se ili volas krei gvidantojn, kiel Prezidanto, aŭ eĉ „Lia Moŝto la Lumo de la Matena Stelo de la Esperantistoj de la Okcidento”, aŭ uzi kiu ajn titolon. Se ili deziras havi bankkonton, tiuokaze necesas la organizo. Eĉ tio estas simpla, ĉar oni povas havi bankkonton kiel grupperanto. Do, nia Esperanto-Klubo povas elekti prezidanton kaj sekretario-kasiston, kiuj servas kiel agantoj kaj establas bankkonton. Ili agadas por la aliaj membroj. Kiam la grupo decidas ekposedi teron, tamen tiu ĝenerale devas korporaciĝi.

Iam la korporaciĝo estis afero de la parlamenta favoro. Hodiaŭ tamen ĝi estas simpla afero fari tion, kion la ŝtata leĝo normigas. Ĝenerale, kiam tri aŭ pli da civitanoj deziras havi apartan juran personecon, ili plenisigas banketon por nomo de iu, kiu akceptos jurajn dokumentojn en nomo de la grupo. Ekzistas ankaŭ malgranda pagenda kosto. Post la pago, la grupo fariĝas rajtigita al ĝia nomo kaj personeco. La grupo tiam ekzistas kaj la individuaj membroj estas protektataj kontraŭ la ŝuldoj de la grupo.

La formado de politikaj partioj estas simila. En Usono, la partio estas difinita kiel grupo de civitanoj

havantaj similajn celojn pri politika aktiveco aŭ kiuj volas elekti samajn individuojn al postenoj. Tio signifas ke la plej malgranda partio konsistas el du individuoj. Ili rajtas kunveni kaj diskuti siajn celojn kaj peni pri varbado de la partianoj sen malhelpo ĝis ili komencas rekomendi la perfortan renverson de nuna Usona Konstitucio. Tiuokaze la agado, protektita de la Konstitucio, estas perdita kaj eble ili estas minacataj per krimaj sankcioj. Tamen, kiel estis menciite, la Usona Supera Juĝistaro limis la povon de la ŝtatoj agi kontraŭ la partioj. En Usono, do, krom la konataj Demokratia kaj Respublika Partioj, estas multaj aliaj partioj, al kiuj etendiĝas la sendanĝerigo, kiel vegetarisma kaj kontraŭalkohola grupoj.

Komprenibile la celo de iu politika partio, estas meti ĝian nomon sur la balotilo por akiri voĉdonojn. Denove la individuaj ŝtatoj diferencas en detaloj, sed en ĝenerale kongruas. Ĉar ŝtato Ohio tipas ĉiujn, jen estas la priskribo de la leĝo de tiu ŝtato.

Por esti sur la balotilo, oni devas transdoni la pet-skrifton. Ĉi tiu necesigas subskribojn nombre egalajn al sep procento de la voĉdonintoj en la lasta elekto. Politikaj partioj devas havi subskribojn de dek kvin procento de la voĉdonintoj, por akiri lokon sur la balotilon. Tiam ĝi konservas la lokon ĝis la voĉdonantoj donas al ĝi malpli ol dek procento de la voĉdono en la elekto. Poste ĝi devas denove trovi subskribintojn de dekkvin procento aŭ perdas sian lokon.

Eĉ, se oni malsukcesas akiri la necesan sep procenton por meti sian nomon sur la balotilon, tamen tiu povas peti, ke siaj amikoj subskribu lian nomon per mano sur la balotilon. Se sufiĉe da enskribintoj faras tion, li fariĝas elektita. Ne estas necese diri, ke tre malmultaj kandidatoj venkas tiel.

Sindikatoj kutime ne estas enkorpiĝitaj asocioj, malgraŭ tio, ke ili formiĝas sammaniere kiel aliaj asocioj. Tamen, iliaj grandeco kaj potenco necesigas la forlason de rigora teorio. Do, kvankam teorie ili ne havas juran personecon, fakte, la juro pritraktas kvazaŭ ili havus tion. La juro limigas la ŝuldojn — kolekteblajn — de individuaj membroj, kaj permesas jurajn procedojn kontraŭ la membroj.

La sindikatoj akiras rajtojn per la rimedoj difinitaj de la Nacia Dungi-trilata Departemento (por dungantoj, kies aktiveco estas en interŝtata aŭ internacia komerco) aŭ la ŝtata departemento (por dungantoj kies aktiveco estas en unu sola ŝtato). Tio estas: la sindikatoj prezentas al la koncerna departemento, kartojn subskribitajn de la dungitoj, kiun la sindikato volas prezenti. La departemento tiam kontrolas la voĉdonojn inter la diversaj sindikatoj (kaj kontraŭ sindikato), kiuj petas lokon sur la balotilo. La sukcesa grupo estas atestita de la departemento kiel reprezentanto de la dungitoj. Tio daŭras ĝis petoj estas preparitaj kaj transdonitaj al la departemento peti alian elekton por nuligi la ateston. Tiam nova elekto komenciĝas.

Nova Konstitucio en Germana Demokratia Respubliko

Jam delonge evidentiĝas, ke la konstitucio en Germana Demokratia Respubliko ne plu konformas al la nuntempa evolustato de nia respubliko. Pro tio necesas ellabori novan konstitucion, kiu unuflanke respegulas la grandajn akiraĵojn en la pasintaj 18 jaroj de post la ekzisto de nia ŝtato kaj aliflanke fiksas novajn, akirendajn celojn. La popola parlamento en sia kunsido en decembro 1967 detale okupiĝis pri tiu demando kaj formis komisionon, al kiu apartenas personoj el ĉiuj tavoloj de la enloĝantaro. Krome en ĉiuj laborejoj, institucioj kaj organizaj rondoj, kaj en domkomunumoj komencis granda diskutado pri la kreenda nova konstitucio. Fine de januaro ĉi-jare la parlamento jam povis okupiĝi pri la de la komisiono ellaborita projekto de nova konstitucio. Intertempe ĉiu familio ricevis projekton de la nova konstitucio kaj la granda popoldiskutado estas daŭrigata, nun ĉefe pri la teksto de la unuopaj paragrafoj. Ekde Decembro 1967 la gazetoj ĉiutage presas bilancojn de unuopaj personoj pri ilia evoluado dum ekzisto de nia ŝtato. Ankaŭ la konstitucio estas analizata kaj ekde Februaro niaj civitanoj diras sian opinion pri la projekto de nova konstitucio. Ankaŭ aliĝproponoj estas farataj.

Nia konstitucio estis kreata dum Marto 1949 de la tiama Germana Popolkonsilantaro post diskutado en pli ol 9000 kunvenoj. 503 aliĝproponoj estis faritaj. Pro tio 52 el 144 paragrafoj estis ŝanĝitaj. La Germana Popolkongreso en Majo 1949 konfirmis la konstitucion.

En tiu jaro la regostaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko — en interkonsento kun rondo de la okcidentgermana monopolkapitalo — fendis Germanion per kreado de la Bonn-a separatŝtato. Per la konfirmo de la Parizaj kontraktoj flanke de la tima Adenaur-registaro kaj la tri okcidentaj imperialismaj ŝtatoj, la fendo de Germanio estis pliprofundigata. Motivo por la fendo estis, fari el Okcident-Germanio bazon de la imperialismo, kaj al bastiono en la batalo kontraŭ la socialismo. Tio kontraŭis al la vivintereso de la nacio.

La fendo de Germanio, flanke de la Bonn-a separatŝtato, necesigis fondiĝon de fakte demokrata ŝtato en tiutempe de Sovetunio okupata Orient-Germanio. La Germana Demokratia Respubliko konstituiĝis la 7-an de Oktobro 1949. Ĝi transprenis de la Germana Popolkongreso la konfirmitan konstitucion. Ekde 1959 ĝi posedas plenan suverenecon.

1949 tiu konstitucio estis granda progreso. Ĝi estis la unua kontraŭmilita konstitucio en Germanio, kiu ne nur donis formalajn rajtojn al la civitanoj. Ĉiuj donitaj rajtoj estas realigitaj. Multaj direktivoj el tiu konstitucio jam delonge estas realeco. Ekzemple laborleĝo, citita en pragrafo 18, jam ekzistas de post 1961, post intensa diskutado en laborejoj. Paragrafo 16 deklaras ĉiun dimanĉon kiel ripoztagon. Sed jam de post septembro 1967 krome ĉiu sabato estas ripoztago. Ekde Aprilo 1966 jam ĉiu dua sabato estis ripoztago.

En la jaro 1949 ekzistis ĉe ni kontraŭfaŝisma demokrata sociordo. Pezindustrio sur teritorio de GDR preskaŭ ne ekzistis. El ruinaĵoj sub tre malfacilaj kondiĉoj dum la pasintaj 18 jaroj estas kreita floranta industrio kaj ni nun troviĝas inter la 10 gvidantaj industri-ŝtatoj en Eŭropo. Iamaj privataj industri-entreprenoj nun estas duonŝtataj per ŝtata financa partopreno je pli ol 50%. Tio signifas, ke tiuj industriaj entreprenoj precipe ŝtate estas gvidataj kaj partoprenas socialisman planekonomion. Multaj iamaj entreprenistoj estas komplementarioj. Ilia laboro ne plu sole servas al privataj celoj, sed al la komunaj streĉoj por evoluado de la produktivfortoj kaj al la pliiĝo de la socia posedo. La unuiĝoj dela popolapartenaj uzinoj helpas al tiuj dunŝtataj industri-entreprenoj, transiri al modernaj teknikaj metodoj, kaj atingi preskaŭ saman altiĝon de la laborproduktiveco kiel la popolaj uzinoj. La gelaboristaro en duonŝtataj industri-entreprenoj ĝuas samajn rajtojn kiel tiu en popolaj fabrikoj.

Granduzinoj post 1945 estis deklaritaj kiel proprietaĵo de la popolo. Ambaŭ bienuloj, posedintaj pli ol 100 hektaroj, estis senproprigiitaj kaj la lando disdonata inter kamplaboristoj kaj etkampanoj. La senproprigiigo de tiuj bienuloj necesiĝis, ĉar laŭ historiaj spertoj ili uzis sian potencon por reakciaj agoj kaj en tiaj bienoj kolektiĝis la kontraŭrevoluciuloj. Sekve la senproprigiigo servis al la fortikado de la popolregistraro. Sed ĉar de post jarcentoj la kamplaboristoj postulis propran grundon kaj la etkampanoj sufiĉe da propra grundo, ne eblis tiuj popolapartenigi la grundon kiel sub aliaj historiaj kondiĉoj en Sovetunio, malgraŭ, ke la agrarreformo ne estis socialista decido. Sed ĝi estis grava premiso por realigi pliajn socialistajn reformojn.

1949 la unuopaj kampanoj grandparte senmasine prilaboris la teron. Sed jam 1952 fondiĝis la unuaj kooperativaj agrikulturmastrumoj. Ekde 1960 ĉiuj kampanoj aliĝis al tiuj kooperativaj kaj la kampoj estas kulturataj per grandmaŝinoj. Per tio la rikoltoj multe pligrandiĝis. Ankaŭ fondiĝis kooperativaj de ĝardenistoj, metiistoj, fiŝistoj ktp. La vivmaniero de la kampanoj de post tiam profunde ŝanĝiĝis. La tekniko grandskale estas aplikata en la kooperativoj, ankaŭ rilate bestbredado, kaj anstataŭas antaŭan manlaboron. La kooperativkampanoj ne plu laboras de krepusko ĝis sunmalleviĝo, sed havas regulitan labortempon. Ilia vivnivelo alproksimiĝis al tiu de urbanoj, estiĝis modernaj vilaĝoj kun evoluita kultura vivo. La kooperativkampanoj kvalifikadis kaj kleriĝis. Ili estas memkonsciaj homoj. En la pasintaj 18 jaroj ankaŭ ĉe la cititaj aliaj kooperativmembroj kaj ĉiuj aliaj civitanoj de nia ŝtato grave altiĝis la vivnivelo.

La nuna konstitucio fiksas la rajton kaj devon de la civitanoj je kunlaboro ĉe la solvo de ŝtataj taskoj. Evoluis tre multflankaj formoj de kunlaboro en la

plej diversaj sferoj. Ĉe la unuigintaj popolarpartenaj uzinoj ekzistas sociaj konsilantaroj, ĉe uzinoj produkt-komitatoj ktp. En la agrikulturo estiĝis kooperativaj konsilantaroj.

Ankaŭ ĉe la jurapliko de post 1949 vasta kunagado de la civitanoj ĉiam pli evoluis. Skabenoj nun krom kunagado ĉe ĉiuj unuinstancaj procesoj, ankaŭ plenrajte kun la juĝisto decidas ĉiujn aliajn antaŭ- aŭ post-procesajn demandojn. Jam de post 1953 ekzistas t. n. konfliktkomisionoj. Unue ili pritraktis nur malgrandajn laborkonfliktojn, sed de post kelkaj jaroj ankaŭ bagatelajn krimojn. En la loĝkvartaloj la arbitraciaj komisionoj de post kelkaj jaroj havas la samajn taskojn. Domkomunumoj en parto de la domoj evoluis kaj jam ludas gravan rolon.

La ŝtata strukturo ankaŭ ŝanĝiĝis. Ne plu ekzistas apartaj landoj kiel Saksio, Turingio ktp. Jam 1952 distriktoj kaj subdistriktoj — sendepende de la iamaj landaj limoj — estis kreitaj. Ne plu ekzistas izola ŝtata prezidanto de post la morto de Wilhelm Pieck, sed ŝtata konsilantaro. K-do Walter Ulbricht estas ties prezidanto.

Nova konstitucio ne nur devas respeguli nian nunan evoluon — staton, sed fiksi akirendajn direktivojn kaj helpi pluan fortikon de ekonomio kaj agrikulturo. La lasta kaŭzo konstantan plibonigon de nia vivnivelo. Alta klerig- kaj kulturŝtato de niaj civitanoj estas celataj kaj devis esti fiksita en la nova konstitucio, krome ankoraŭ pli ampleksa kunagado de ĉiuj civitanoj ĉe solvo de ŝtataj taskoj.

Jam en la novjara parolado Walter Ulbricht povis konstati, ke la laboro je la nova konstitucio bonprog-

resas (intertempe la projekto ĉe ni estas diskutata) kaj ke ĝi estos fundamenta leĝo por germana politiko de paco, demokratio, socialismo kaj popolamikeco. La Unuigintaj Nacioj deklaris la jaron 1968 kiel „Jaro de Homoj Rajtoj”, bazante sin sur la solene publikigita deklaro de la homrajtoj el la jaro 1948 de la 3-a asembleo de UN. Tiu deklaro diras, ke ĉiuj homoj, sendepende de raso, sekso, lingvo, religio, politika konvinko, nacia aŭ socia deveno, posedo de propraĵo kaj naskiĝcirkonstancoj, estas samrajtaj. En 27 kromaj paragrafoj tiuj rajtoj estas detaligitaj, inter ili la rajto je laboro, klerigado, demokrata kunagado kaj protekto de la persona libereco kontraŭ arbitreco.

Tiuj homrajtoj, plivastigitaj de la 21-a Asembleo de UN kiel konvencio de homrajtoj, en 1968 devas esti ĉefa tasko por la laborado de UN. Tiurilate multo estas farenda. Ni nur pensu pri la usona agreso en Vjetnamio kaj la agreso de Israelo sur araba teritorio kaj pri la kruela persekutado kaj torturado de progresemaj homoj, kiel ekzemple Theodorakis per la faŝisma reĝimo en Grekio. En Sudafriko ankoraŭ validas kruelaj rasleĝoj, en Usono negroj pro sia haŭtkoloro estas traktataj kiel duarangaj homoj. Citinde estas, ke tiaj agoj okazas per ŝtatoj, kiuj 1948 kundecidis la deklaron pri homrajtoj aŭ, kiel Israelo, ĉe la aliĝo agnoskis.

Nia kontribuo al la „Jaro de Homaj Rajtoj” estu nia nova socialista konstitucio, bazante sin sur la plej alta homrajto, defendo de la paco!

Noto. La projekto de la konstitucio estis pritraktita en 750 000 aranĝoj, kiujn partoprenis 11 milionoj da civitanoj. Ili donis 12 454 proponojn al 118 paragrafoj. La referendumon voĉdonis jese 94.49% de la loĝantaro.

OPINIO

„Ni deziras esprimi al vi korajn dankojn pro sendado de ekzempleroj de *Internacia Jura Revuo*, kiun ni alte taksas kiel taŭgan elementon por plenumi: unue, nepran bezonon de interkonaj pri jura scienco en ĉiuj landoj; due, trafe de Esperanto-lingvo: faktoj kiuj, sendube, allogos la atenton de aktivuloj kaj saĝuloj de la tuta mondo.

Baldaŭ ni aranĝos aliĝon al tiu interesa Revuo kaj Asocio de Juristoj. — Dume ricevu vi nian gratulojn kaj bondezirojn por plenumsukcesa laboro.”

(Asociacion Mexicana del Patrimonio Familiar)

„Mi gratulas vin, ke la Revuo jam estos presata malgraŭ, ke antaŭa ĝia aspekto estis ankaŭ agrabla. Vi estas nelicegebla kaj mi sincere admiras vian energion, kaj deziras al vi ĉion bonan kaj ankaŭ sukcesojn en nia agado.”

Roman Sakowicz (Nowa Sól)

„La lasta presita numero de nia revuo tre plaĉis al mi kaj mi gratulas vin pro via redaktora laboro.”

Albert Bessiere (Saint Malo)

„Kun grandega ĝojo mi legis la unuajn numerojn de *IJR*, kiujn tute hazarde mi vidis ĉe unu mia kolego.

Nia ĝojo estis ankoraŭ pli granda, kiam poste mi vidis unuan presitan kajeron de la Revuo. Mi trovas la revuon tre interesa kaj utila. Pro tio mi tutkore gratulas la Internacian Esperanto-Asociacion de Juristoj pro la bonega decido komenci eldoni tian revuon. Bonvolu akcepti miajn sincerajn dezirojn por pluaĵ sukcesoj de la Revuo.”

Dimitre Hadĵev (Sofia)

„Mi tre dankas pro la ricevitaj de ekzempleroj de la 6-a n-ro de *IJR*, kiun kun granda intereso mi ĉiam legas kaj pro bela aspekto (modesta, sed eleganta) mi ankaŭ ofte ekspozicias, montrante Esperanto-revuojn.”

S-ino M. Kolinska (Szczecin)

BIBLIOGRAFIO

Esperanta Finnlando, N-ro 4., 5., 6.

La Socialisto, N-ro 22., 23., 24.

Impulso, N-ro 3.

The British Esperantist, N-ro 743., 744., 745., 746., 747.

Heroldo de Esperanto, N-ro Apr., Majo, Junio, Julio,

Aŭgusto, Septembro.

Franca Esperantisto, N-ro 254.

Pri Geedzeco kaj Familio

(El la Fundamentoj de Leĝdonado de Soveta Unio kaj Federaciaj Respublikoj)

La zorgo pri soveta familio, en kiu harmonie kombiniĝas la publikaj kaj personaj civitanintereso, estas unu el la plej gravaj taskoj de la Soveta Ŝtato. En Soveta Unio estas la plej favoraj kondiĉoj por firmigo kaj prospero de la familio.

Persiste kreskas la materiala bonstato de la civitanoj, pliboniĝas la loĝej-cirkonstancoj kaj kulturaj vivkondiĉoj de la familio. La socialisma socio dediĉas grandan atenton al protekto kaj stimulado de la patrineco, al garantio de la feliĉa infaneco.

La edukado de la nova generacio, evoluado de ĝiaj fizikaj kaj spiritaj kapabloj estas la plej grava devo de la familio. La Ŝtato kaj la Socio ĉiurimede helpas al la familio je infanedukado: oni larĝskale konstruas reton de la infangardenoj kaj infanvartejoj, de lernejo-internulejoj kaj aliaj porinfaninstitucioj.

Por la soveta virino estas garantiataj la necesaj socie kutimaj kondiĉoj por la feliĉa patrineco, kaj pli kaj pli aktiva, kreanta partopreno en la produktanta kaj en la publikpolitika vivo.

La soveta leĝdonado pri geedzeco kaj familio celas la aktivan kontribuon al definitive purigi la familiajn rilatojn de la materialaj profitoj, al forigo de restaĵo pri neegala pozicio de la virino en ĉiutaga vivo kaj al estigo de la familio, en kiu troviĝas la plena kontentigo de la plej profundaj personaj konsentoj.

Parto 1 ĜENERALAJ TEZOJ

Art. 1.

Taskoj de la Soveta Leĝdonado pri Geedzeco kaj Familio

La taskoj de la Soveta Leĝdonado Pri Geedzeco kaj Familio estas:

- plua firmigo de soveta familio, bazita sur la principoj de komunisma moralo;
- elformigo de la familiaj rilatoj je la memvola geedziĝo de virino kaj viro, je la libero de materialaj profitaj sentoj, je la reciproka amo, amikeco kaj estimo de ĉiu familiano;
- edukado de la infanoj en la familia zorgo kombini kun la publika edukado al la sindono de patrolando, de la komunisma rilato al la laboro kaj preparado de la infanoj por aktiva partopreno je la konstruado de komunisma socio;
- ĉiurimeda protekto de la intereso de patrino, infanoj, kaj certigo de la feliĉa infaneco por ĉiu;
- definitiva forigo de malutilaj restaĵoj kaj de la pasintecaj kutimoj en la familiaj rilatoj;
- edukado al la sento de respondeco en la familio.

Art. 2.

Rilatoj, kiujn reguligas la Leĝdonado pri Geedzeco kaj Familio

La leĝdonado pri geedzeco kaj familio fiksas la ordon kaj la kondiĉojn pri geedziĝo; reguligas la personajn kaj havajrilatojn estantaj inter la geedzoj, gepatroj kaj infanoj, krome inter aliaj familianoj; la rilatojn aperantajn konekse kun la adopto, prizorgado kaj kuratoreco; reguligas la ordon kaj kondiĉojn pri geedzecerompo — divorco —, kaj la ordon rilate la registradon de aktoj de la civitana stato.

Art. 3.

Egalrajteco de la virino kaj viro en la familiaj rilatoj

En la familiaj rilatoj la virino kaj viro posedas egalajn rajtojn ĉu persona, ĉu prihavaĵa.

Egalrajteco en la familio estas bazita sur la garantioj de la Konstitucio de USSR. Egalrajteco ekzistas por virino kaj viro en ĉiuj sferoj de la ŝtata, publikpolitika, ekonomia kaj kultura vivoj.

Art. 4.

Civitana egalrajteco en familiaj rilatoj ne dependas de nacieco, raso kaj religio

Ĉiuj civitanoj, sendepende de sia nacieco, raso kaj religio, posedas egalajn rajtojn en la familiaj rilatoj.

Ne estas allasataj kia ajn rekta aŭ pera rajtlimigo, fiksado de rekta aŭ pera avantaĵoj ĉe la geedziĝo kaj en la familia rilatoj depende de la nacieca, rasa aparteno aŭ religio.

Art. 5.

Protektado kaj Stimulado de la Patrineco

La patrineco en USSR estas ĉirkaŭata de la tutpopola honoro kaj la estimo estas protektata kaj stimolata de la ŝtato. La protekto de la patrino kaj infana intereso estas garantiataj per la organizo de vasta reto de la lernejo-internulejoj kaj aliaj porinfaninstitucioj; per pagata ferio al virino pro gravedeco kaj akuŝo; per fiksado de la privilegioj al gravedaj virinoj kaj patrinoj, per ŝtata monhelpoj al la patrinoj havantaj multajn infanoj; ankaŭ per alia ŝtata kaj publika helpo al la familio.

Art. 6.

Jura Reguligo de la Ŝtato pri Geedzeca kaj Familia Rilatoj

La juran reguligon pri la geedzeca kaj familia rilatoj en USSR nur la ŝtato efektivigas.

La geedzeco estas agnoskata nur per interkonsento fare de la ŝtataj organoj per formalajoj koncerne aktojn de la civitana stato. La religia rito de geedziĝo, samkiel ankaŭ aliaj religiaj ceremonioj, ne havas juran signifon.

Hungardevenaj geedzoj. La edzo elmigrante, dum la edzino loĝadas en Budapeŝto. Edziĝorompo antaŭ hungaraj tribunaloj. La edzino rajtas ricevi renton de sia eksterlanda edzo.

(Tiel juĝis la civila Tribunalo en Lieĝo, Belgio, freŝdate.)

La antaŭaj faktoj:

En la jaro 1964, kiel unuinstanca, la centra distrikta Tribunalo en Pest (Hungario) rompis la edzecon de s-ro A. kun s-ino T. pro la jenaj kialoj:

a) la geedziĝa kunvivado estis interrompita en 1956, kiam la edzo eksterlanden foriris;

b) antaŭ la disiĝo jam okazis malkonsentoj; sekve nenia espero ekestis al restarigo de la geedziĝa kunvivado, krome la interspaco finfine estas iginta mallogon unu al la alia.

Tiu juĝo estas aprobita de la Budapeŝta ĉefurba Tribunalo, kiel duainstanca Tribunalo, kaj kiel ĝi enhavas finan plenuĝitan formon.

Postulado antaŭ la belga Tribunalo:

La eksedzino celas kondamniĝi la eksedzon al pagado de porviva rento, surbaze de art. 21-a de la hungara Civila Kodo.

Kompetenco:

La edzo, sindefendanto, asertas kompetenta, nur la Tribunalon, kiu edziĝrompon estigis.

Respondis kontraŭe la Tribunalo, ke la sindefendanto loĝas en belga distrikto, kie estos plenumata la devigo, kaj tial ĝi deklaras sin kompetenta.

Pri la postulado:

La sindefendanto asertas, ke la postulo ne estas akceptebla, kial:

1. ĝi bazas sur art. 301 de belga Civila Kodo kio — li diris — permesis la Tribunalon asigni porvivan renton nur al la eksedz(in)o, kiu „gajnis” la eksedziĝon;

2. en la nuna afero la porviva rento estas nur flankajo de la ĉefa postulado, nu, tiu ĉi estas finfine juĝista de la duainstanca Tribunalo en Budapeŝt.

LA TRIBUNALO

1. pri la unua juĝargumento:

La postulo neniel bazas sur art. 301 de belga Civila Kodo, sed sur la eksterlanda juĝo, kiu la eksedziĝon permesis: tiu ĉi entenas implicitan rajton por la eksedzino postuli porvivan renton, laŭ art. 21 de hungara Civila Kodo.¹

Tiaj juĝdisponoj neniel kontraŭas la belgan sistemon pri publika sekureco. Flankokaze — diras la Tribunalo krome — la edziĝrompa juĝo reliefigis nek la kulpon, nek la miskondukon de la postulantino dum la edzecon.

2. pri la dua juĝargumento:

Tia postulo al posteksedziniĝa rento ne fariĝis „flankajo”, laŭ la komunuza senco, dum la eksedziniĝa proceduro; ties memkompreneble — ĝi — estas sekvo, sed ĝin oni ankaŭ povas, kaj eĉ ĝenerale devas enkonduki ekster la ĉefa postulo; vidu art. 301 de belga Civila Kodo.

DECIDAS:

La postulo estas akceptebla.

Porvivan renton pagos la eksedzo al sia eksterlanda eksedzino.^{2, 3}

¹ La plej ĝenerala jurisprudencio — belga kaj franca — tiel oponias, t. e., ke la eksedziĝa leĝo ankaŭ validas rilate al porviva rento inter la eksedziĝitaj partioj.

² Ĉu fariĝos apelacio kontraŭ la supra juĝo, mi ne scias. Sed la apelacia Kortumo verŝajne sammaniere juĝos, vidu la noton 1.

³ Postulo al edziĝrompo de hungara edzo kontraŭ la edzino hungara — la edzo loĝanta en Germana Federala Respubliko, dum la edzino loĝadas en Hungario — pledas la germanaj Tribunaloj: art. 17. II. E. G. E. G. B. germana: validas la germana leĝo. (Supera Landkortumo, Virtembergo, 13-a de Februaro 1962.)

Tiu ĉi regulo ne koncernas la religiajn ritojn kaj por ties atesto ricevitaĵojn dokumentojn pri la naskiĝo; pri la interkonsento de la geedziĝo; pri la senvalidigo de la geedzeco; pri la morto, se la menciitaj ceremonioj okazas ĝis la formigo aŭ restarigo de sovetaĵoj pri la formalajo koncerne aktojn de la civitana stato.

Art. 7.

La Leĝdonado de USSR kaj Federaciaj Respublikoj pri Geedzeco kaj Familio

La leĝdonado pri geedzeco kaj familio konsistas el tiuj fundamentoj kaj konforme al ili, el la aliaj dekretitaj leĝdonaj aktoj de USSR, el la Kodoj pri Geedzeco kaj Familio; kaj el aliaj aktoj de la Federaciaj Respublikoj.

La leĝdonado de la Federaciaj Respublikoj solvas la demandojn per ĉi-samaj fundamentoj, kaj demandojn pri la geedzeco kaj familiaj rilatoj, kiuj en la fundamentoj ne estas antaŭviditaj.

Art. 8.

Appliko de la Leĝdonado de Federaciaj Respublikoj pri Geedzeco kaj Familio

La geedziĝon, la rilatojn inter geedzoj, gepatroj kaj infanoj, la adapton, la fikson de patreco, la punon per alimentoj, la prizorgadon kaj kuratorecon, la senvalidigon de geedzeco, la registradon de la aktoj pri la civitana stato reguligas la Leĝdonado de la Federaciaj Respublikoj, kies organo establas aŭ registras koncernan akton de la civitana stato aŭ solvas la estiĝitan konflikton.

La valideco de la geedzeco, de la adopto, la fikson de la prizorgado kaj kuratoreco, la validecon de la aktoj pri la civitana stato determinas la Leĝdonado de la Federaciaj Respublikoj, sur kies teritorio estiĝis la geedziĝo, efektiviĝis la adopto, estas fiksitaj ĉu prizorgado aŭ kuratoreco, ĉu estas registrita la akto pri la civitana stato.

Protokoloj de la Kunvenoj de IEAJ dum la U. K. en Madrid

A) Ĉefkunveno

La Ĉefkunveno de la Asocio okazis lundon, la 5-an de Aŭgusto 1968, en la „Salono Kabe” de la Kongresejo, konforme al la tagordo sendita la 3-an de Junio per la Bulteno n-ro 1/1968.

1. **Malfermo:** La prezidanto, Prof. D-ro Ivo Lapenna malfermis la kunvenon kaj konstatas, ke ĝi estas kunvokita konforme al la Statuto. Li ankaŭ konstatas, ke entute ĉeestas 12 membroj. La prezidanto informas, ke la sekretario-kasisto, D-ro Ludwig Röhl, bedaŭrine, ne povas ĉeesti, kaj tial li mem faros koncizan protokolon. Poste la prezidanto memorigis per kelkaj varmaj vortoj la forpasintan membron, D-ron Wilhelm Herrmann, kaj emfazis liajn meritojn ne nur por la Asocio, sed ankaŭ por la Esperanto-movado ĝenerale.

2. **Fikso de definitiva tagordo:** La provizora tagordo, komunikita en la Bulteno n-ro 1/1968, estas akceptita kiel definitiva.

3. **Raporto pri la agado IEAJ:** Pro la neĉeesto de d-ro Röhl, la prezidanto mem legas la raporton pri la agado de la Asocio en la laborjaro 1967—68. La prezidanto aparte akcentas la gravecon de Internacia Jura Revuo ne nur por la membraro, sed ĝenerale por progresigo de la jura scienco, kaj por antaŭenigo de internacia kunlaboro inter juristoj. Kvankam ne ĉiuj artikoloj estas sur la sama scienca nivelo, tamen multaj meritus aperi en nacilingvaj tradukoj. Tio ne nur kontribuas al pli bona kompreno de la traktitaj aspektoj en la juraj sistemoj de diversaj landoj, sed ankaŭ helpus al disvastigo de la Internacia Lingvo en juristaj medioj. La prezidanto esprimas dankon al D-ro Lajos Márton pro lia sindona laboro kiel redaktoro de la revuo. El la raporto sekvas, ke la Asocio havas 157 membrojn en 31 landoj. Laŭ la Jarlibro de UEA por la jaro 1967 ekzistas nur 38 fakdelegitoj pri juro en 19 landoj. Tio signifas, ke ĉ. 120 membroj de la Asocio ankoraŭ ne estas fakdelegitoj pri juro. La prezidanto varme rekomendas al ĉiuj membroj aliĝi al UEA, kaj fariĝi fakdelegitoj pri juro, menciante eventuale en parentezoj la apartan juran branĉon, pri kiu ili specialiĝis. Tio estas la plej bona kaj efika vojo por praktika utiligo de la Internacia Lingvo sur la kampo de jura helpo. Estus ankaŭ utile urezenti ĉiujare koncizan statistikon pri la nombro de juraj intervenoj de niaj fakdelegitoj kaj ĝenerale de la membraro. La prezidanto mem — li diras — faras ĉiujare almenaŭ 4—5 servojn kiel fakdelegito pri juro, kaj ofte ricevas valoran helpon de juraj fakdelegitoj el diversaj landoj.

Ekestas mallonga diskuto, en kiu partprenas pluraj membroj, kaj ĉiuj esprimas kontenton pri la laboro de la Estraro. La raporto estas akceptita unuanime, sen rimarkoj.

4. **Kasraporto:** Ankaŭ tiu ĉi raporto estas akceptita unuanime. La kunveno rekomendas al ĉiuj membroj reguligi kiel eble plej baldaŭ siajn kotizojn. La kunveno petas D-ron Röhl sendi pri tio novan cirkule-

ron al la membroj. La prezidanto kolektis kelkajn kotizojn de la ĉeestantaj membroj kaj sendos ilin al la sekretario-kasisto.

5. **Sensarĝigoj:** La kunveno unuanime sensarĝigis la Estraron rilate ĝian laboron. Ĉar ne estis elektoj, restis la sama Estraro.

6. **Diversaĵoj:** a) **Publika Kunveno:** La prezidanto atentigas, ke bedaŭrine, ne povos okazi publika kunveno laŭ la ĝisnuna kutimo, nome kune kun kolegoj neparolantaj la Internacian Lingvon, ĉar la afero ne povis esti ĝustatempe organizita. Tamen, la publika kunveno okazos, kiel anoncite, la 7-an de Aŭgusto je la 4-a horo posttagmeze en „salono Canuto”. Ĉar la kunveno estas publika, estus bone indiki kiel eble plej multajn nemembrojn, kiuj interesiĝas pri la temo, des pli, ke verŝajne ĉeestos unu aŭ pluraj reprezentantoj de ambasadoj. b) **Temo de la publika kunveno en Helsinko:** Post iom da diskuto la kunveno fine decidas lasi la elekton de la temo al la Estraro de la Asocio.

Per tio la tagorodo elĉerpigis kaj la prezidanto fermas la kunvenon je la 17-a horo.

B) Publika Kunveno

La Publika Kunveno de la Asocio okazis merkredon, je 7-an de Aŭgusto, en „Salono Canuto”, inter la 16-a kaj 18-a horoj. Prezidis Prof. D-ro Ivo Lapenna kaj ĉeestis entute 35 personoj, inter kiuj la reprezentanto de la Dana Ambasadoro en Madrid.

La ĉeffemo de la kunveno estis „La Rajto de Kunveno kaj Organiziĝo laŭ la Juro de Diversaj Landoj” (okaze de la Juro de Homaj Rajtoj). Estis prezentitaj raportoj pri la koncernaj leĝoj kaj aliaj juraj aktoj de Francujo, Usono, Soveta Unio, Jugoslavio, Norvegujo, Finnlando, Hungarujo, Germanujo kaj Aŭstrio. Ĉiuj raportoj sekvis la skemon sugestitan de la Estraro, nome la preskribojn rilate jurajn formojn (antaŭkondiĉojn, registriĝojn, juran personecon); la fondiĝon kaj malpermeson, laŭ la tri ĉefaj grupoj: asocioj, politikaj partioj kaj sindikatoj. Surbaze de la raportoj ekestis diskuto. Montriĝis, ke la juraj reguloj en ĉiuj traktitaj landoj havas komunajn trajtojn, sed ke estas sufiĉe klare distingeblaj tri bazaj konceptoj: la angla—usona, la kontinent-eŭropa bazita sur la romia juro, kaj la soveta, inkluzive la jurajn sistemojn similajn al tiu de Soveta Unio. La raportoj aperos en Internacia Jura Revuo.

Antaŭ ol fermi la kunvenon la prezidanto dankis al ĉiuj raportintoj kaj al la ĉeestantoj pro ilia interesiĝo. Li konstatis, ke la membroj de la Asocio konsiderinde kontribuis al la programo de tiu ĉi kongreso, kiu ja okazas sub la signo de la Homaj Rajtoj. Tiurilate li menciis la prelegon pri la Universala Deklaracio en la Internacia Somera Universitato, la resumon pri la Kulturaj Rajtoj kaj Lingva Diskriminacio en la Kongresa Libro, kaj la partoprenon de la membroj en la Unua Ĝenerala Kunveno, kiu traktis unuavice la demandon de kulturaj rajtoj.

Protokolis: Prof. D-ro Ivo Lapenna

★ Enciklopedio de Esperanto ★

Nova Fondajo de UEA

Nia Lingvo Internacia estas pli ol 90-jara. En 1887 aperis en Varŝovio la unua lernolibro de Esperanto, kaj — laŭ ĝia modesta aspekto — oni apenaŭ povus imagi, ke ĝiaj facila rompeblaj paĝoj enhavas tiel ŝtalan fortikon, tiel nedetruoblan dinamikon. Sed ja tiu manlibro posedis la mikson de realismo kaj idealismo necesan por movi intereson kaj fervoron de homoj, kaj tial la lingvo firme enradikiĝis, komencis kreski kaj disbranĉiĝi kaj fortikiĝis laŭlonge de pli ol 80 jaroj.

La arbo Esperanto fariĝis tiel branĉoriĉa kaj front-abunda, ĝia disvolviĝo tiel plenigis de interesaj detaloj, ke fariĝis nepre necese tion registri, kiel eble plej fidinde kaj objekte. Tial jam antaŭ ĉirkaŭ 40 jaroj meritplena eldonisto, nome Vilmos Bleier, lanĉis la unuan **Enciklopedio de Esperanto** en Budapeŝto, kiu en du ilustritaj volumoj traktis la fenomenon Esperanto en ĝiaj aspektoj lingva, scia, kultura, kaj kiel ĝi konsistigis gravan eron en la vivo de multaj homoj el ĉiuj mondpartoj. Unuvorte: temis pri la plej detala historio de la movado ĝis tiam ekzistanta. Sed tiu Enciklopedio jam de jaroj estas tute elĉerpita, kaj la vivo de la movado dum tiuj pasintaj 40 jaroj senhalte disvolviĝis.

Nuntempe la movado do tre forte bezonas unu tian konsultilon. Kompreneble, temas pri herakla laboro. Analizi, kribri, kompari, redakti en metodon tuton la informojn konatajn kaj aldone la nun esploratajn, tio postulas longan, pedantan, plurhoman laboron. Tamen

lia ambicia entrepreno jam nun efektiviĝas. Grupo da esperantistoj, kies nomoj garantias seriozecon kaj altan profesion nivelon al iliaj kontribuajoj, preparas la gigantian laboron, kiu konsistigos la novan **Enciklopedio de Esperanto**. Tiu libro certe fariĝos mejloŝtona, ne nur de nia propra literaturo, sed ĉefe kiel dokumentilo de nia movado.

Kiel dirite, la entrepreno estas herakla; sekve ĝi estas samtempe multekosta. La financaj rimedoj disponeblaj ne sufiĉas por kovri la kostojn de la redaktado kaj edlonado (temos pri pluraj volumoj). Sed ni ne dubas, ke ĉiu, kiu scias taksu la epokfaran gravecon de la redaktata Enciklopedio, eldonota de STAFETO, sub aŭspicioj de CED, ne hezitos kunhelpadi per sia mono. Tiucele la Estraro de UEA decidis starigi Fondajon por helpi la aperon de la nove Enciklopedio.

Sub la ĉefredaktoreco de U. Lins, kiu asociis al sia laboro R. Hauptenthal, ja makceptis esti ĉefkunlaborantoj A. Albault, W. Auld, M. Gjivoje, K. Kalocsay, I. Lapenna, Miyamoto M., J. Régulo, V. Sadler, W. Solzbacher, H. R. Tonkin, G. Waringhien, kaj multaj aliaj sin devontigis kunlabori pri konkretaj temoj aŭ fakoj. Tio montras al vi la neceson subteni la plenumatan laboron.

★

Kontribuajojn por la Fondajo Enciklopedio oni sendu al la landaj perantoj de UEA aŭ rekte al: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Feriu en Jugoslavio

Esperanto-Societo en Ljubljana perparis agrablan kaj trankvilan, malmultekostan ripozejon en **Volparrija**, kiu situas sur la okcidenta marbordo de la duoninsulo Istrio, en Jugoslavio. Ĝi nomiĝas: **Internacia Esperanta Ferio-Centro**, kaj troviĝas meze de pina arbareto kun milda mediteranea klimato kaj vegetaĵo.

La loko estas facile atingebla per aŭtobusoj, kiuj preterveturas plurfoje tage. IEFC disponas per tri vilaoj, kun entute 150 litoj en 2—3-litaj ĉambroj, kun varma kaj malvarma akvo.

Apud la ĝardena restoracio estas dancplato, globlud-ejo, parkejo kaj duŝoj. IEFC posedas propran strandon kun cementita plato por sumado, kaj proprajn banbudojn. La akvo estas purega kaj atingas 27 gradojn C. La bansezono daŭras de la 15-a de Majo ĝis la fino de Septembro.

La administranto kaj kelneraro estas esperantistoj.

Oni zorgas ankaŭ pri distraĵoj (dancmuziko, kulturaj programoj, filmoprezentoj, prelegoj ktp.). Ekzistas multaj eblecoj por ekskursoj: al Portoroj, Koper, Potojana (mondfamaj grottoj), Lipica (mondfama ĉevalbredejo), Porec, Pula, al proksima Italujo ktp.

Kompleta pensio estas de 2,60 ĝis 3,60 us. dol. aŭ egalvaloro. Konsiderante ĉiujn avantaĵojn do, tre malmultekoste.

Se vi volas ĝui malmultekostajn feriojn en agrabla klimato kaj internacia, esperantista medio, postulu ilustritan prospekton aŭ tuj rezervigu ĉambrom. Invitas vin:

**IEFC de Esperanto-Societo,
Ljubljana. Poŝtfako 401,
Jugoslavio**

★ MAILLONGE ★

Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, aliĝinta faka asocio de UEA, distribuis al ĉiuj delegitaro ĉe la Konferenco de UN pri la Juro de Traktatoj (Vieno, Marto—Majo 1968) 32-paĝan Esperantan tradukon de „Projekto de artikoloj pri la juro de traktatoj”. La tradukon faris membro de IEAJ, s-ro Amb. Ralph L. Harry.

Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ)

(ALIGINTA FAKA ORGANIZO DE UEA)

estas fondita en 1957, dum 42-a Universala Kongreso de Esperanto, en Marseille (Francujo).

El la decidoj de la fondkunveno:

1. rekomendi al ĉiuj juristoj-esperantistoj aliĝi kiel individuaj membroj al UEA kaj fariĝi fakdelegitoj pri juro;
2. aliĝi la Asocion, se eble kiel sekcion, al „International Law Association”, kaj rekomendi al ĉiuj juristoj-esperantistoj aliĝi kiel individuaj membroj al naciaj sekcioj de tiu internacia asocio de juristoj.

La celo de IEAJ estas:

- a) disvastigi la Internacian Lingvon inter la juristoj kaj antaŭenigi ĝian praktikan uzadon en la internaciaj rilatoj de juristoj;
- b) helpi la utiligon de la Internacia Lingvo por fakaj, profesiaj kaj sciencaj celoj de la membroj.

Ordinara membro povas esti akceptita ĉiu persono, kiu diplomiĝis ĉe Jura Fakultato aŭ samranga Alta Lernejo, kaj kiu parolas la Internacian Lingvon. Kiel eksterordinara membro povas esti akceptita ĉiu esperantisto, kiu estas studento de juro, aŭ kiu laboras en juĝejo, tribunalo, advokata aŭ notaria kancelario, aŭ en simila jura institucio. Kiel subtenanta membro povas esti akceptita ĉiu fizika aŭ jura persono, kiu per siaj kontribuoj deziras helpi la Asocion.

Aliĝojn akceptas Sekretarioj-kasistoj je la subaj adresoj.

Kotizo estas 2 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro jare. Ĝi inkluzivas la abonon de la oficiala organo.

Organo fondita en 1966, dum 51-a Universala Kongreso de Esperanto, en Budapeŝto (Hungarujo), de la Asocio estas „Internacia Jura Revuo”.

Abonprezo por nemembroj: 1 usona dolaro aŭ egalvaloro jare.

Plenumkomitato por la laborjaro 1966—1969:

Prezidanto: **Prof. D-ro Ivo Lapenna**, profesoro pri Kompara Soveta kaj Orienteŭropa Juro en The London School of Economics and Political Science, Universitato de London, (Brit.).

Vicprezidantoj: **Roman Sakowicz**, advokato, **Nova Sól** (Pollando)

Erwin Stolpe, juĝisto, **Berlin** (Okc. Germanujo).

Sekretarioj-kasistoj: **D-ro Ludwig Röhl**, notario, Friedrich-von-Teck-Str. 3. D-8884 Höchststadt/Donau (Okc. Germanujo);

D-ro Lajos Márton, prokuroro, Hajnóczy utca 2, **Budapeŝto, XII.** (Hungarujo).

Publikaj Kunvenoj de IEAJ, al kiuj estas invitataj ĉiuj membroj de la Asocio, kaj kongresurbaj juristoj-nesperantistoj por pritrakti komparjuran temon, okaze de la Universalaj Kongresoj:

Mainz (Germanujo), 1958: Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj;

Bruxelles (Belgujo), 1960: La pozicio de advokato en diversaj landoj;

Harrogate (Britujo), 1961: La respondeco de la aŭtoposedantoj;

Kobenhavn (Danlando), 1962: Evoluoj en la Soveta Juro (1958—1962);

Den Haag (Nederlando), 1964: La koncepto de proprieto kaj ĝiaj ĉefaj limigoj en diversaj landoj;

Budapeŝto (Hungarujo), 1966: La principo de egalrajteco de seksoj en la familia juro de diversaj landoj;

Rotterdam (Nederlando), 1967: La ŝtataneco laŭ la juro de diversaj landoj.

Madrid (Hispanujo), 1968: La rajto de kunveno kaj organiziĝo laŭ la juro de diversaj landoj.